

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Geedzoj Thorsen
subvencias
E-bibliotekojn

14-a Influo:
Pri senpaga
reklamo kaj
surstrata
propagando

Eŭropa pensado
en Eŭrop-Unia
Kongreso



Elserĉi parencajn idearojn

Enhavo

- 121 Kulturo: Geedzoj Thorsen kreas Bibliotekan Apogon Kongresoj: UK en 2000 bonvena ankaŭ en Israelo (Amri Wandel)
- 122 1996 kaj la sekvoj... (Mark Fettes)
- 124 Eŭropo: Pentekoste en Stutgarto (Dieter Dungert); Inter bonaj eŭropanoj (Ulrich Lins); Unuafoje kongresis kroataj esperantistoj (Spomenka Štimec)
- 126 Kalendaro 1997-98
- 127 Eŭropo: Denove landa asocio en Slovakio (Stano Marček)
Faka agado: Sekvu la blindulan ekzemplon (Ritva Sabelli)
- 128 Junularo: Tre praktikaj laborgrupoj en Budapeŝto
Interlingvistiko en Poznań
- 129 Speciala sekcio: *Influo* numero 14
- 133 Akademio de Esperanto: Ĉu ŝanĝi la statuton? (François Lo Jacomo); Akademias elektoj
- 134 Recenzo: *L'homme qui a défié Babel*. Ludwik Lejzer Zamenhof (Antoine Chalvin)
- 135 Laste aperis
- 136 La diligenta kolegaro: De hobia al profesia uzo
Kelkaj titoloj de Kava-Pech ĉe la Libroservo de UEA
- 137 Kulturo: FAME serĉas premiojn
- 138 Loke – Persone – Fake
- 139 Oficiala Informilo
Anoncetoj
- 140 Radio: Ĉiutagaj raportoj el Adelajdo (Andrzej Pettyn)
Nekrologoj

Vi trovos

eble enua, eble entuziasmiga, konforme al via movada temperamento, ke pluan fojon ĉefrolas Kampanjo 2000 en nia revuo. Mark Fettes (p. 122-125) konvinke klarigas ke ne temas pri “kampanji por kampanji”, kun la sola celo blovi aktivigan venton al la senondaj akvoj de nia movado — male, Kampanjo 2000 direktiĝas eksteren, malfermen. “Malfermi niajn kongresojn, konstrui aliancojn, ŝanĝi nian kulturon” — la ambiciaj celoj vortumitaj de Fettes indikas ke Kampanjo 2000 pretigas vojon al movadaj ŝanĝoj eventuale pli radikalaj ol pensas eĉ multaj el ĝiaj apogantoj. Igi niajn proprajn idealojn kaj celojn klaraj al ni mem, tio ne povas resti sen profunda efiko sur la agadon kiun ili inspiras.

Post plurflanka prilumado de la kampanjo-propono en ĉi tiu revuo, la parolvicon nun prenos la komitatanoj, kiuj ĝin pridiskutos en la Adelajda UK.

La kovrilo: Cláudia Cristina Grecco Bandeira el Brazilo pozas antaŭ afiŝo de la aranĝo ESPEREKO, “renkonto de Esperanto, sporto kaj ekologio”. Ŝi estas filino de Dilmá Cavalcante Bandeira (estro de Kultura Esperanta Centro en la urbo Goiânia), kiu sendis la foton.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktotafino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; DEM 55; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifoj (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ✉+39-6-39-72-61-69; ✉mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉+31-50-3613763 [of]; ✉A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ✉+1-613-565-9279; ✉mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ✉amri@vms.huji.ac.il.

Geedzoj Thorsen kreas Bibliotekan Apogon

La lastatempa atento al la funkciado de Esperanto-bibliotekoj, interalie sur la paĝoj de nia revuo, ricevas tre konkretan sekvon en grandanima donaco de la konata dana esperantista paro Roma kaj Poul Thorsen.

Ges-roj Thorsen donacis 120 000 danajn kronojn (ĉ. 35 000 gld.) por disponigi al UEA komencan kapitalon por subvencii la plej bazan bezonon de ĉiu biblioteko: havigon de libroj. En sia aprila kunsido la Estraro de UEA danke akceptis tiun noblan donacon.

Interkonsente kun la mecenatoj, la Estraro konfirmis regularon por la Biblioteka Apogo de Roma kaj Poul

Thorsen, kun jena celo: "La Biblioteka Apogo sponsoras plivastigon de Esperanto-bibliotekoj, ne financataj de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco. Ekzistantaj privataj kolektoj subtenindas laŭkvalite kaj se ĝenerale alireblaj."

La Biblioteka Apogo uzos por la jaraj subvencioj la gajnitan rentumon kaj maksimume dekonon de la komenca kapitalo. Sekve, almenaŭ teo-

rie, ĝia bonhavo rajtos elĉerpiĝi en dek jaroj. Ĉies donacoj estas bonvenaj por plifortigi la kapitalon kaj por tiel pligrandigi la jarajn subvenciojn.

La Biblioteka Apogo tuj ekfunkcias, per alvoko al E-bibliotekoj sendi subvenci-petojn al la Centra Oficejo de UEA antaŭ la 15-a de oktobro 1997. La subvencioj estas uzeblaj ekskluzive por aĉeto de libroj ĉe la Libroservo de UEA. La peton devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigitaj laŭ prefero. Por la unuaj subvencioj disponeblas ĉ. 3500 gld. Pri la subvencioj decidis la estrarano de UEA pri kulturo kaj la ĝenerala direktoro.

KONGRESOJ

UK en 2000 bonvena ankaŭ en Israelo

Sondinte en aprilo la kongresan pretecon de Zagrebo (vd., jun., p. 104), ĝenerala direktoro Osmo Buller prospektore vizitis ankaŭ Israelon en la tagoj 17-19 junio.

Israelo preskaŭ gastigis Universalan Kongreson antaŭ 30 jaroj, sed pro la minaca situacio kiu poste kulminis per la ses-taga milito (1967) la 52-a UK estis translokita de Tel-Avivo al Roterdamo. Ĉi tiu mondoparto restas do unu el la malmultaj kie neniam okazis UK. Tio povus ŝanĝiĝi se akceptiĝus la invito de Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) kongresi en Israelo en la jaro 2000.

La urbaj kaj registaraj instancoj montris grandan interesiĝon pri gastigo de UK. Vic-ĉefministro Moshe Katsav, ministro pri turismo, akceptis Buller en sia Tel-Aviva buroo. La renkontiĝon, kiu daŭris pli ol duonhoron, partoprenis ankaŭ Eldad Salzman, prezidanto de ELI, kaj Amri Wandel, estrarano de UEA. El la ministerio de turismo ĉeestis ĝenerala direktoro David Litvak, vicedirektoro pri merkato kaj la direktoro de la departemento pri internaciaj konferencoj. Ministro Katsav montris sinceran interesiĝon pri la Esperanto-movado kaj promesis efektive subteni la kongreson. Koncerne la politikan medion kiu ĉirkaŭas la kongreson, la ministro esprimis sian deziron, eĉ certecon, ke definitiva packontrakto estos atingita ene de

malmultaj jaroj, laŭ la interkonsento de Oslo. La ministro donacis al Buller libron kun dediĉo en Esperanto. Sekvis tagmanĝo kun reprezentantoj de la ministerio kaj de la gazetaro.

La moderna kongresa centro kaj hotela komplekso Dan Panorama, la kandidata kongresejo en Tel-Avivo, organizis koktelan akcepton por Buller kaj la LKK, dum kiu la direktoro klarigis la eblojn kaj avantaĝojn de la centro por la specifaj bezonoj de UK.

Buller estis akceptita ankaŭ de la unua vicurbestro de Tel-Avivo, Nathan Wolloch, kiu jam de multaj jaroj helpas

la agadon de esperantistoj. Poste ĉiĉeronino gvidis Buller tra la turismaj urbopartoj proksime al la kongresejo.

Kvankam la invito de la UK validas por Tel-Avivo, ELI konsideras ankaŭ la eblon kongresi en Jerusalemo, kiu havas, krom multaj turismaj kaj kulturaj allogaĵoj, apartan simbolan valoron kiel sankta urbo por tri grandaj religioj. Buller do vizitis ankaŭ la konferencan centron kaj hotelon Renaissance, la malnovan urbon de Jerusalemo, kaj estis akceptita de la vicurbestro, prof. Ariel Cohen, kiu promesis ke la urbestro aranĝos akcepton por ĉiuj kongresanoj en la Muzeo de Israelo, unu el la plej gravaj kaj riĉaj muzeoj de la lando.

Amri Wandel (Israelo)

Osmo Buller (maldekstre) ricevas libro-donacon de vic-ĉefministro Moshe Katsav.



Foto: Israel Sun Ltd.

1996 kaj la sekvoj...

La proponita Kampanjo 2000 alvokas al nova etapo en la evoluo de la movado.

Ekzistas du manieroj ŝanĝi la mondon. Per agoj kaj per ideoj. Ekde la komenco, la Esperanto-movado aplikas ambaŭ rimedojn. Plejparton de la Unua Libro plenigas eseo pri ideoj. Nur en la fino aperas praktika rimedo por transformi la ideojn en agojn. Same tra la pasintaj cent dek jaroj, la movado ĉiam dediĉis grandan parton de siaj rimedoj al la produktado kaj konsumado de ideoj — ne nur en la formo de artikoloj kaj manifestoj, sed ankaŭ kiel poemoj kaj romanoj, historioj kaj eseoj.

Ideoj estas tamen nur lingve esprimeblaj. Verkita en Esperanto, la granda idea riĉeco de la Esperanto-movado ne rekte kontribuas al la lingva transformiĝo de la mondo, sed pli ĝuste firmigas kaj evoluigas la Esperanto-komunumon mem. Ĝi subtenas la agan flankon de la movado, la volon daŭre uzadi Esperanton por celoj milopaj. Sed ĝi apenaŭ tuŝas la freneze malŝparan kaj maljustan lingvan ordon kiu regas la vivojn de 5 miliardoj da homoj.


La proponita Kampanjo 2000, pri kiu diskutos la Komitato de UEA en Adelajdo, alvokas al nova etapo en la evoluo de la movado: al transpaŝado de tiu lingva limo. Konsciaj kaj fieraj pri niaj ideo kaj aga tradicioj, ni insistu pri ilia valoro en tutmonda skalo. Samtempe ni elserĉu parencajn ideojn, kiuj instruos al ni pli bone koncepti kaj organizi nin mem. En la praktiko tio signifas ke ni eniras longan periodon de pena perado inter kulturoj: inter la spertoj kaj tradicioj de la Esperanto-movado, tiuj de aliaj internaciaj organizaĵoj kaj movadoj, kaj tiuj de lokaj kulturoj kaj komunumoj tra la mondo. Ne eblas konvinki aliajn pri la valoro *agi* Esperante (t.e. lerni kaj uzi la lingvon) sen unue konvinki ilin pri la valoro de niaj ideoj. Kaj por tio ni mem devas ekkoni niajn eblajn aliancinojn pli bone ol ĝis nun.

Ĉi tie mi volas skizeti kelkajn eblajn prioritatojn kaj strategiojn por tiu longa perada fazo.

Svingi la Manifeston

La Manifesto de Prago estas provo resumi kelkajn kernajn ideojn de la Esperanto-movado en komprenebla kaj super-rigardebla formo. Laŭ la reagoj — kaj oni ne povas ignori la aprobon de pli ol ses mil subskribintoj — ĝi estas nun konsiderebla kiel norm-dokumento sur tiu tereno. Per tio mi ne volas diri ke ĝi fideinde respegulas la penson de ĉiuj esperantistoj. Estus ja strange se en tiel varioplena komunumo regus unuanimeco pri io ajn! Sed se oni volas paroli pri la socimovada aspekto de Esperanto, ekde nun oni vole-nevole devas komenci ĉe la Manifesto de Prago, eĉ se nur por kritiki ĝin.¹

Kompreneble, ne ĉio dirinda estas direbla en tia mallonga dokumento. Tial estas grave daŭrigi nian komunan ideadon pri la temoj kiujn ĝi tuŝas: demokratio kaj lingvaj rajtoj, plurlingveco kaj lingva diverseco, edukado pri lingvoj kaj kulturoj, homa emancipiĝo. UEA intencas stimuli tiun debaton en Esperanto per la eldono de pluraŭtora diskutdokumento. Tamen, kiel jam dirite, tia enmovada ideado estas jam parto de nia tradicio, kaj fortike enradikiĝinta. Kio estas nova, tio



Konstrui aliancojn: reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj kunstarigas la Koalicion de NRO-j por Internacia Lingvo (8 majo, Novjorko).

estas la jam evidenta forta volo ekigi similajn debatojn sialande kaj sialingve, surbaze de tradukoj. En tiu senco, la jaro 1996 eble vere markas la komencon de nova epoko.

Jen kelkaj manieroj uzi nacilingvaj tradukojn de la Manifesto, plejparte jam sukcese elprovitaj:

- proponi por publikigo en nacia revuo aŭ novaĵagentejo, eventuale kun akompana artikolo;
- proponi por publikigo en organoj de organizaĵoj pri homaj rajtoj, “tutmonda” edukado, paco, ekologio, evoluigo kaj similaj temoj;
- dissendi kun nacilingva informbulteno pri Esperanto kaj lingvaj problemoj;
- dissendi kun la landa E-revuo por loka diskonigo;
- presi kiel flugfolion por uzado en manifestacioj, lingvo-firoj, konferencoj kaj simile;
- aldoni al TTT-ejoj kaj bultenejoj en Interreto.

Atentaj legantoj de la Manifesto ekkomprenos ke Esperanto ne estas nur lingva ŝatokupo, sed integra parto de klopodoj konstrui pli justan mondon. Kaj, same grave, ili ekperceptos ke ne necesas atendi ĝis la realiĝo de diversaj utopioj por ke Esperanto indu lernadon kaj uzadon.

Malfermi niajn kongresojn

Alia novaĵo de la pasinta jaro estis la Nitobe-simpozio ĉe la UK en Prago. Mi jam raportis sufiĉe detale pri ĝi (okt. '96, p. 162-164), sed ĉi tie mi volas re-prezenti al vi la kernan ideon. Dum la pasintaj 92 jaroj ni al kutimiĝis al la penso ke neesperantistoj havas nur simblan rolon en niaj kongresoj. Tiu tradicio sukcesis kunligi nin pli efike, sed ĝi ankaŭ fariĝis peza kateno en sia antaŭ-Praga formo. Necesas inventi novajn kompromisojn, solvojn al nia propra lingvoproblemo. Tio validas ne nur por UK, sed des pli por regionaj aŭ landaj



kongresoj, kie la lingvoproblemo malpli rolas. Se ni vere celas krei movadon de (almenaŭ) dulingvuloj kaj dukulturuloj, ni kuraĝu postuli pli de niaj kongresanoj.

La Praga simpozio estis unu ebla modelo: aparta dutaga aranĝo por ekstermovadaj gastoj kaj esperantistaj interesitoj, dum la kongreso mem. Jen kelkaj aliaj ideoj:

- temdebato dulingva, kun samtempa interpretado (Jane Edwards sukcese organizis tian sesion ĉe la Havana UK);
- en landaj kongresoj, temdebato duparta: unu sesio nur en nacia(j) lingvo(j) kun partopreno de eksteraj fakuloj, alia sesio en Esperanto;
- antaŭ- aŭ post-kongresa aranĝo, kun dulingva ceremonio kiel ponto inter la “kongreso” en Esperanto kaj la nacilingva “konferenco”;

• gastigado de unuopaj fakuloj en kunsidoj pri specifaj temoj (mi aplikis tiun metodon en du Tagoj de la Paco en UK, kun sinsekva interpretado, kaj ĝi pli-malpli bone funkciis).

Mi ne pretendas ke tiaj aranĝoj faciligas la vivon de kongresaj organizantoj! Sed mi estas konvinkita ke ili devos fariĝi normalaĵo de la “post-Praga” movado. Krom pruvi la realecon de Esperanto al iom pli da influuloj, ili alportos plurajn pli gravajn avantaĝojn. Unue, la kongresoj fariĝos iom pli alireblaj por tiuj komencantoj kiuj jam parolas la koncernan nacian lingvon kaj do povos partopreni almenaŭ unu aranĝon sen lingva handikapo. Due, se oni bone elektos la gastojn, malaperos la impreso de izoliteco. (La Pragaj kongresanoj klare ĝojis pro la serioza traktado de Esperanto fare de ekstermovadanoj.) Trie, la gastoj helpas importi novajn sciojn kaj ideojn en la movadon iom pli ofte kaj sisteme. Kvare, niaj aktivuloj plispertigos pri argumentado en nacilingva situacio, anstataŭ ĉiam rafini siajn ideojn en Esperanto.

Konstrui aliancojn

Jam multaj landaj kaj fakaj asocioj starigis rilatojn kun unuopaj asocioj pri kulturo, edukado, UN kaj similaj temoj. Tamen ofte montriĝis malfacila vivi tiujn rilatojn. Tiel restos same longe kiel Esperanto-asocioj dediĉas sin nur al Esperanto, dum aliaj rigardas ĝin en plej bona kazo kiel interesan sed ne tre sukcesan eksperimenton. Ĝuste transponti tiun dividon estas unu el la ĉefceloj de Kampanjo 2000.

La Manifesto de Prago proponas novan ponton, traktante Esperanton kiel rimedon anstataŭ kiel celon en si mem. Multegaj homoj interesiĝas pri la problemoj kiujn listigas la Manifesto: problemoj de demokratio, de homaj rajtoj, de edukado ktp. Ili ellaboras proprajn solvojn, kiuj ofte havas grandajn meritojn, eĉ se ili ne plene sukcesas sur la lingva kampo. Ĝuste pri tiaj temoj kaj movadoj la bezono de reciproka perado estas plej vasta. Se ĉiu ĝeneraltrema Esperantorevuo ekdediĉus duonon de sia enhavo al diversaj agadoj (enkaj ekster-movadaj) por la sep principoj de la Manifesto, mi kredas ke ĝi fariĝus interesa ne nur por nia publiko, sed ankaŭ por la ekstera mondo.

Jen kelkaj esplorindaj temoj — ne nur por la gazetaro, sed ankaŭ por seminarioj, studtagoj, laborgrupoj, eldonaĵoj, kaj por aliancoj kun aliaj organizaĵoj:

- la situacio de minacataj lingvoj kaj movadoj por ilia subteno;
 - naciaj kaj internaciaj normoj pri minoritataj rajtoj, aparte sur la kampoj de lingvo, kulturo kaj edukado;
 - filozofioj kaj metodoj por transnacia edukado (aŭ internacia, tutmonda, ekologia, kontraŭrasisma ktp);
 - etikoj kaj metodikoj de lingvoinstruado;
 - la rilatoj inter demokratio kaj ekonomiaj, politikaj, kulturaj kondiĉoj en diversaj landoj;
 - diversaj spertoj pri du- kaj plurlingveco, ekzemple en familioj kaj diasporoj;
 - la ĉiutaga vivo de ordinaruloj dise tra la mondo, kaj la ebloj plibonigi ĝin per simplaj agoj de solidaro.
- Konantoj de la organizaĵo Monda Kunagado, kiun mi helpis starigi antaŭ kelkaj jaroj, rekonos plurajn el tiuj temoj. Kvantam MK mem dormetas lastatempe, atendante alfluon de novaj aktivuloj (kontakto min aŭ Ulrich Becker se vi interesiĝas, aparte pri administraj taskoj!), neniuj bezonas atendi ĝian reaktiviĝon por mem ekagi. Kiel Árpád Rátkai siatempe komentis en la revuo, tia interkultura perado estas kerna tasko de la Esperanto-movado kiel tuto, ne de unusola “faka” asocio. Ni nur devas rekoni tiun kernecon kaj doni al ĝi konvenan prioritaton en niaj laborplanoj.

Ŝanĝi nian kulturon

Mi intence formulis la ĉi-suprajn sugestojn kiel eble plej ĝenerale. Kampanjo 2000 ja celas ĉiujn, ekde izolitoj kaj lokaj kluboj ĝis la gvidorganoj de UEA. Dum estraranoj, komisiitoj kaj oficistoj provos realigi ĉi tiujn ideojn je la nivelo de UK kaj UN, aliaj aktivos en sia propra medio. Informu nin pri viaj provoj, ĉu sukcesaj aŭ malsukcesaj!

Restas ja la ĉiama demando, kiel mezuri la sukceson. Multaj indaj agadoj malpli videblas ol la Nitobe-simpozio, malpli vast-gamas ol la Manifesto. Ofte ne eblas definitive taksu ĉu iniciato portis daŭran efikon aŭ ne. Ĉu ricevinto vere legos sian flugfolion? Ĉu seminario pri interkultura komunikado ja ŝanĝos la pensadon kaj konduton de partopreninto? Necesas tempo kaj pacienca ripeta agado en iom larĝa kaj longperspektiva kadro. Unuopaj, sporadaj iniciatoj havos multe malpli da efiko ol zorge planita serio. Finfine temas pri ŝanĝo de la kulturo de Esperantujo, kiel antaŭkondiĉo por renovigita klopodoj ŝanĝi la mondon. (*daŭrigo sur p.125*)

Pentekoste en Stutgarto

La Tria Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso (16-19 majo) okazis en Germanio, en la ĉefurbo de la federacia lando Baden-Virtembergio.

Samtempe kaj samloke aranĝis siajn naciajn kongresojn la francoj kaj la germanoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 400 personoj el 22 landoj, do ne nur el Eŭropa Unio.

“Eŭropo — kien vi?” estis la kongresa temo, enkondukita per la parolado de la prezidanto de Germana E-Asocio (GEA), Frank Stocker, dum la solena inaŭguro. Li konstatis i.a. ke Eŭropo signifas respekton de diverseco kultura, sociala, ekonomia, rasa aŭ alia, kaj defendon de tiuj valoroj. EU iru al forta, fidinda kaj komuna ekstera politiko, al respondecas kaj konscia defendo de homaj rajtoj. Tion eblas atingi nur per komuna sento de la civitanoj surbaze de eŭropa publikeco. La rolon de la esperantistoj sur tiu ĉi vojo Stocker difinis jene:

- Ni kontribuu al la ĝeneralaj diskoj kaj evoluo.
- Ni enmiksiĝu en la ĝeneralan debaton.
- Ni montru ke ni estas la sola tuteŭropa popola movado.
- Ni montru ke ni estas kompetentaj.

La aranĝoj lige al la kongresa temo distingiĝis per afero kaj kompetenteco. Membro de Eŭropa Parlamento (EP), d-ro Rolf Linkohr parolis pri “Pligrandigo de EU al oriento”, Michael Cwik (Eŭropa Komisiono) pritraktis la temon “La valuto-unio”, kaj d-ro Werner Bormann parolis pri “La lingva problemoj de EU”, konstatante i.a. ke la lingva demando en EU estas tabuo, pri kiu oni faras nenion, kaj dum tio la angla gajnas terenon. Dum podia diskuto EP-ano Siegbert Alber atentigis pri la tri necesaj “i”, nome informado, integriĝo kaj identiĝo.

En la aranĝo “La Akademio de Esperanto respondas lingvajn demandojn” ties prezidanto, d-ro Werner Bormann, elokvente skizis la pro-

blemojn kaj detale respondis. Zlatko Tišljar prezentis la novan “Asociacion por Eŭropa Konscio”, asertante i.a. ke, ĉar lingvo estas krom komunikilo ankaŭ identigilo, kreo de eŭropa identeco ne eblas sen eŭropa identec-lingvo.



La Tria Eŭrop-Unia E-Kongreso fariĝis loko de serioza kulpensado pri Eŭropo.

Okazis fermita kaj publika kunvenoj de la komitato de Eŭropa E-Unio (EEU), kiu donis al si novan statuton, subskribitan dum la solena fermo de la ĉeestantaj landaj reprezentantoj.

La kongresanoj akceptis rezolucion, kiu i.a. konstatas ke “la manko de demokrata solvo al la problemoj de rekta interhoma komunikado inter la eŭropaj civitanoj konsistigas grandegan

malhelpon al la progreso de la Eŭropa konstruado”, deklaras ke “lernado de la internacia planlingvo Esperanto, sekvata de laŭebla lernado de unu aŭ pluraj etnaj lingvoj, estas la plej taŭga vojo por atingi egalrajtan komunikadon kune kun pli profunda reciproka kono”, “atentigas la instancojn de Eŭropa Unio, la naciajn registarojn kaj la publikan opinion pri la ebleco, kiun la Esperanto-movado proponas laŭ la Manifesto de la Esperanto-Movado” kaj konfidas al EEU “la taskon reprezenti la Esperanto-movadon antaŭ la instancoj de Eŭropa Unio, prezenti al ili la eblecojn de ‘planlingvo’ kaj ĉiel kunlabori kun ili cele al atingo de pli bona interkomunikado inter la Eŭropanoj.”

Dum la jarĉefkunveno de Germana E-Asocio oni elektis novan estraron, daŭre kun Frank Stocker ĉekape. D-ro Detlev Blanke estis honorita per la Zamenhof-medalo pro sia meritplena scienca laborado.

La gazetara konferenco rezultigis bonan eĥon: ekz. la regiona radio elsendis pri Esperanto kaj la kongreso tutan duonhoron, kaj artikole raportis la ĵurnalo *Stuttgarter Zeitung*.

Aparte sukcesa estis speciala invito de esperantistoj el partneraj urboj de Stutgarto — Samara (Rusio), Lodzo (Pollando) kaj Brno (Ĉeĥio) —, kiun tiuj akceptis multnombro.

La Kvara EEK okazos post tri jaroj en Oostende (Belgio).

Dieter Dungen (Germanio)

Inter bonaj eŭropanoj

La organizantoj sukcesis venigi al la kongreso du germanajn anojn de la Eŭropa Parlamento, malgraŭ tio ke ili nek subtenas nek estimas Esperanton. La du parlamentanoj, kiuj sendube ĉeestas multegajn kunvenojn kun civitanoj kies entuziasmo por “Eŭropo” restas limigita, evidente ŝatis alfronti homojn kiuj post iliaj prelegoj ne sidis mute, sed montris trankvile — kvankam ne senemocie — siajn reagojn, restante en la rolo de interesitaj kaj informitaj aŭskultantoj, de bonaj eŭropanoj.

Tute ne okazis, kiel eble timis LKK, ke iu subite ekstarus por fari trudan pledon por Esperanto. Mi memoris kiom multe UEA penis sub Lapenna eduki la esperantistojn al nesekteca varb-agado, precipe surbaze de la “Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo” (Frostavallen, 1956). Tra la historio ofte iuj troentuziasmoj fuŝis la bildon de seriozeco kiun prave celas nia movado. En Stutgarto ili feliĉe mankis.

Ulrich Lins (Germanio)

Unuafoje kongresis kroataj esperantistoj

Estas nekutime ke lando kies unuaj E-parolantoj figuras jam en la adresaro de Zamenhof kaj en kiu E-klubo ekfunkciis en 1907, nur post naŭ jardekoj okazigas sian unuan kongreson.

La movado bone konas plurajn E-aktivulojn kiuj lernis la metion en Kroatio (ni pensu nur pri d-ro Ivo Lapenna). Ili ĉiuj aktivis sub la nomo de aliaj ŝtatoj al kiuj Kroatio apartenis. Nun en 1997 kreigis la kondiĉoj por okazigi la unuan kongreson de la kroataj esperantistoj, la semajnfino 31-a de majo – 1-a de junio, en Zagrebo.

En la riĉa kongresa programo partoprenis 200 aliĝintoj, kiuj venis el 12 landoj. La urbestrejo senpage disponigis la kongresejon en la urbocentro kaj la turisma asocio de la urbo la kongresajn sakojn kaj ŝildojn.

La prezidanto de Kroatia E-Ligo, Honora Patrono de UEA, Dalibor Brozović, kontribuis al la kongresa ĉeftemo, “Esperanto en Kroatio kaj la nuntempa mondo”, per entuziasmiga prelego pri Esperanto fine de la jarmilo. D-ro Ivo Borovečki kompetente analizis tradukojn de naŭ jardekoj el la kroata lingvo al Esperanto. Lian prelegon ilustris riĉa ekspozicio de E-libroj en Kroatio.

Nikola Rašić prelegis pri la nomo de la kroata lingvo en Esperantaj vortaroj, analizinte ne malpli ol 60 eldonojn de 28 vortaroj ĉi-jarcentaj por la uzantoj de la kroata kaj serba lingvo(j). Aldone, li traktis pri la organizado de Universala Kongreso, ĉar

Kroatio kandidatiĝis kiel kongresurbo por la jaro 2000 (vd. jun., p. 104).

Unu el la kongresaj ekspozicioj rilatis al la eldonoj de la E-lernolibro laŭ la Zagreba Metodo, adaptitaj al 21 lingvoj de la mondo. Pri tiu metodo parolis Zlatko Tišljar, la iniciatinto de la lernilo.

Lumbilda prelego prilumis iujn el la miloj da vizaĝoj kiuj membris en Studenta E-Klubo en Zagrebo, festanta 40 jarojn de agado. La vigla Drama Grupo de SEK surscenigis premiere *La anĝeloj de Babelo* de la kroata aŭtoro Mate Metišić. Por la naskiĝtaga festo de tiu unika studenta Esperanto-klubo kolektiĝis 90 SEK-anoj, eĉ el Skotlando kaj Germanio.

La konata Zagreba aktorino Vida Jerman, kune kun alia Zagreba aktoro-esperantisto Mladen Šerment, ricevis antaŭ la kongreso la ordenon de la ŝtatprezidento por sia kontribuo al la teatra arto. Ŝi prezentis por la kongresanoj la poezian programon *Izolulo*.

La kongresa rezolucio baziĝis je la Manifesto de la Esperanto-movado akceptita en Prago en 1996, kaj emfaze alvokis neregistarajn organizaĵojn elprovi en sia laboro la ĝisnunajn atingojn de Esperanto.

La unuan kongresan tagon estis lanĉita Esperanta poŝtmarko de la Kroata Poŝto kun portreto de Zamen-

hof desegnita de la kroata pentristo Eugen Kokot. Samokaze estis eldonita ankaŭ koverto de la unua tago kun la kongressimbola stampo. (Ankaŭ en Slavonski Brod aperis speciala koverto omaĝe al la kongreso kun stampo de la unua tago. La urbo tiel omaĝis al la unua numero de *La Suda Stelo*, kiu aperis tie en la jaro 1932. Memora koverto, honore al la 110 jaroj de Esperanto, venis el Rijeka.)

Speciala monero de 25 kunaĵoj, kiu dorsflanke portas la tekston “Unua kongreso de kroataj esperantistoj” kaj la kongresan simbolon, bedaŭrinde iom malfruis kaj ne alvenis el la monforĝejo dum la kongresaj tagoj; ĝi estos ekuzata kiel normala pagrimedo en la regula monstemo de Kroatio fine de junio 1997. La internacia lanĉo de la monero okazos en Aŭstralio.

La kongreso riĉigis la E-kulturon ankaŭ per nova libro: antologio de kroataj unuaktaĵoj, omaĝe al 50 jaroj de la Esperanto-klubo Bude Borjan (fondita en 1945), kies membroj Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Zlata Flego, Mirko Mamužić kaj Zlatko Tišljar kontribuis al la libro, kun Klaus Dahmann el Germanio.

Spomenka Štimec (Kroatio)

Red.: En la bildklarigo al nia lasta artikolo pri Kroatio (jun., p. 104) ni erare interŝanĝis la nomojn de Vlatko Pavletić kaj Dalibor Brozović rilate al ilia situo en la foto.

(daŭrigo de p. 123)

Ŝajnas al mi ke multrilate TEJO jam montras la vojon. De kelkaj jaroj, helpe de eŭropaj subvencioj, nia junulara organizaĵo sisteme planas seminariojn kaj eldonas bultenojn pri plej variaj temoj, kaj aktive partoprenas en internaciaj aranĝoj kaj asocioj — eĉ liverante membrojn de ties gvidorganoj. La mal-teja movado aktivas sub malsamaj kondiĉoj, kun propraj fortoj kaj malfortoj; tamen ĝi principe povus sekvi similan evolu-direkton. Jam en diversaj landoj la lasta TEJO-generacio transprenas gvidajn rolojn. Se Kampanjo 2000 gajnos la daŭran subtenon de tiu nova movada ondo, la ŝanĝoj proponitaj ĉi tie baldaŭ fariĝos parto de nia movada rutino.

Mark Fettes

NOTO

1. Kelkaj kritikoj ja aperis. Bernard Golden (feb., p. 32) pridubis la sencon paroli pri “plena regado de Esperanto” kaj la aserton ke tio eblas per memstudado. Mi ne dubas ke neniu kapablas lerni Esperanton ĝis nivelo kontentiga por s-ro Golden! Tamen jam pruviĝis — sufiĉe ofte ke tio estu rekonebla fenomeno — ke izolitoj povas okaze atingi tre bonan komunikkapablon en Esperanto. En alia reago, sendita al kelkaj revuoj, Wolfgang Gunther plendis pro manko de “ekologia” paragrafo. Mi persone simpatias al lia vidpunkto, sed ŝajnas al mi ke la ekologio de Esperanto ankoraŭ ne fariĝis generale komprenata aŭ akceptita principo — kaj la Manifesto celas resumi, ne novismi “rutin-revolucio”. La ĉefa revuo ĉi-tipa, *Literatura Foiro*, publikigis kelkajn fabelecajn asertojn pri la Manifesto, konforme al sia bedaŭrinde

oftiĝanta malobservado de ĵurnalisma etiko. Mi ne vidas neceson pritrakti ilin ĉi tie.

Pli interesa kaj respondinda kritiko aperis en *Riveroj* el la plumo de KONISI Gaku. Li akcentas la kapablon de Esperanto senpartie peri inter diversaj lokaj kulturoj, tiel ke ekzemple nia galaksio povas samtempe nomiĝi en Esperanto “la Lakta Vojo” (okcidentece) kaj “la Ĉiela Rivero” (japanece): “Malsame ol la naciaj lingvoj, kiujn katenas kutimoj kaj rutinoj pro ties tasko portadi la propran kulturon, Esperanto ja kapablas multe pli tolereme enlasi novajn elementojn kaj kombini ilin por kreskigi kaj riĉigi la internacian kulturon.” Laŭ mi, tiu kulturpera kaj kulturkonstrua tasko estas parto de tio kion la Manifesto nomas “transnacia edukado” — pri “mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo”. Sed la demando estas nepre plu diskutinda.

Kalendaro 1997-98

Ĉi-sube sekvas daŭrigo kaj kompletigo de la aranĝo-listo aperinta en marto (p. 51-54). Informoj pri eventoj tie anoncitaj estas nur parte ripetataj. La venonta "Kalendaro" aperos en novembro.

Interreto. Daŭre aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj estas konsultebla ĉe la TTT-paĝoj www.hungary.net/esperanto/. Ĝi estas ankaŭ ricevebla per sendo de jena mesaĝo al <w3mail@gmd.de>: "get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt". En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Evento*.

julio

- 16-24: Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj per E-o, Santiago de Compostela, Galegio, Hispanio (Antonio Alonso Núñez, Rosa, 26-5°C, ES-15701 Santiago de Compostela)
- 17-24: 11-a Internacia Junulara Semajno, Pécs, Hungario (Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c I. 8, HU-8200 Veszprém; ☎+36/88/424-339; <goldend@hal2000.hal.vain.hu>; temo: "Mez-Eŭropo")
- 19-26: 82-a Universala Kongreso de Esperanto, Adelajdo, Aŭstralio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo")
- 24-31: 53-a Internacia Junulara Kongreso, Assisi, Italio (Alessandro Amerio, via Cumiana, 45, IT-10141 Torino; ☎+39/11/385-42-00; ☎/545-731; <a.amerio@agora.stm.it>; <http://www.arpnet.it/esper/iej/iej.htm>; temo: "La homo — ĉu super aŭ parto de la naturo?")
- 26-02 aŭg.: 19-a Renkontiĝo de E-istaj Familioj, Savudrija, Kroatio (Ankica Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb; ☎+385/1/328-265; ☎/1481-01-52; <esperantozg.tel.hr>)
- 27-02: Ebriĝa Mara-Montara Aventuro, Cabanne-Chiavari, Liguria, Italio (Anna Carpi, Via Orsi 26, IT-16043 Chiavari; ☎+39/185/310-171)

aŭgusto

- 01-07: FESTO, internacia renkontiĝo de Junulara E-ista Franca Organizo, Saint-Raphaël, Francio (Pascal Lécaille, B.P. 3019, FR-69394 Lyon Cedex 03; ☎+33/4/72-36-07-14; <pascal@zen.dedal.fr.net>)
- 01-08: 2-a Eŭropa E-Festivalo, Budapeŝto, Hungario (Hungara E-Asocio, pf. 193, HU-1368 Budapeŝto; ☎+36/1/268-03-06; ☎/268-03-31; <esperantohea@mail.c3.hu>; temo: "Komunikado en internaciaj organizoj")
- 02-09: 70-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Aŭgsburgo, Germanio (Hermann Schmid, Waterloostr. 21, DE-86165 Aŭgsburgo; ☎+49/821/792-835; ☎/713-074)

- 02-09: Familia feriado, Savudrija, Kroatio (vd. ĉe 26 julio)
- 03-09: 33-aj Baltiaj E-Tagoj, Haapsalu, Estonio (E-Asocio de Estonio, Raekoja pl. 14, EE-0001 Tallinn; ☎+372/2/682-807; ☎/631-11-57)
- 09-10: 84-a Japana E-Kongreso, Aŭa-Ikeda, insulo Ŝikoku, Japanio (Sekretariejo de la 84-a Japana E-Kongreso, JP-778 Tokusima-ken, Miyosi-gun, Ikedamati, Tanimati; ☎/☎+81/883/720-438; <shigeaki@pm.tokushima-u.ac.jp>)
- 09-15: E-Somerlernejo, Barlaston, Britio (Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; <wedgwood.college@staffordshire.gov.uk>)



51-a Argentina Kongreso de Esperanto, 9-12 oktobro

- 09-17: Eŭropo-Azio '97, Jekaterinburgo, Rusio (p.k. 67, RU-620077 Jekaterinburg-77; ☎+7/3432/224-501, 235-785; <hrgo@sbank.e-burg.su>; temo: "E-o post la jaro 2000")
- 10-15: Seminario por harmoniigi la disvastigon de E-o, Manjakandriana, Madagaskaro (Justine Ralalarisoa, Lot Nr.7, Mandroseza, MG-101 Antananarivo)
- 15-17: 16-a Komuna Seminario de E-o, Taejon, Koreio (Korea E-Junularo, C.P.O. Kesto 7998, Seulo 100-679; ☎+82/2/741-12-91; <keast@soback.kornet.nm.kr>; <http://asitar.kotel.co.kr/~espero/kea>; temo: "E-o en la 21-a jarcento")
- 15-21: 26-a Internacia Renkonto Naturamika, Abaliget apud Pécs, Hungario (E-Asocio de Baranya, pf. 98, HU-7601 Pécs; ☎+36/72/333-123)
- 23-29: 66-a Itala Kongreso de E-o, Napolo (Grupo "Harmonio kaj Progreso", Via Santa Brigida 64, c/o UUCI, IT-80132 Napoli; ☎+39/81/713-08-06; ☎/551-08-74)

28-31: 16-a Literatura Forumo de LF-koop, Napolo, Italio (Esperanta PEN-Centro, Pf. 117, HU-1581 Budapeŝto, Hungario; temo: "Kante kaj poezie")

septembro

- 03-09: 6-a Internacia Turisma Semajno en Malto (Malta E-Societo, P.O.Box 142, Valletta CMR 01 Malto)
- 08-15: Internacia Semajno E-ista, Montpeliero, Francio ("Esperanto", 5 rue du Docteur Roux, FR-34090 Montpelier; ☎+33/4/67-54-15-43)
- 18-22: 9-a Sudbrazila Renkontiĝo de E-o, Porto Alegre, Brazilo (Gaúcha E-Asocio, C.P. 815, Porto Alegre, RS-90001-970; temo: "La socia rolo de E-o")
- 19-21: Krespa Semajnfino, Rennes, Francio (JEFO, vd. ĉe 1 aŭg.)
- 20-21: Seminario "La kultura lingvo", Lesjöfors, Svedio (Stiftelsevägen 1, SE-68096 Lesjöfors; ☎+46/590/30-909; kun M. Boulton, E.-D. Krause, J. Fornal, A. Forman, A. Kankkunen k.a.)
- 24-28: Gdanska Esperanto-kongreso, Polando (Pola E-Asocio, P.k. 222, PL-80206 Gdańsk 6)
- 26-28: Markola Kongreso, Oostende, Belgio (Flory Witdoeck, Witte Nonnenstraat 9A, BE-8400 Oostende; ☎+32/59/702-914; ☎/802-342)

oktobro

- 02-05: 8-a Montkabana Renkontiĝo, Wörth bei Reuris, Aŭstrio (Michael Martin, Bieneng. 9, AT-8020 Graz)
- 02-05: Seminario pri internacia komunikado, St. Andreasberg im Harz, Germanio (Germana E-Asocio, Immentalstr. 3, DE-79104 Freiburg)
- 03-05: Faulhaber-semajnfino, Mennorode, Elspeet, Nederlando (Peter van Noorden, Dr A. Schweitzerlaan 22, 1443 VT Purmerend; temo: "Petro la Granda, sciencaj kaj kulturaj interŝanĝoj")
- 04-11: TEJO-Seminario pri "Edukado al paco", La Chaux-de-Fonds, Svislando (Marion Bélisle, Rue de la Serre 28, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando; <belisle@compuserve.com>)
- 04-11: 5-a Internacia E-Semajno por la Kulturo kaj Turismo, Sant Carles de la Rápita (Tarragona), Katalunio (Hispana Fervoja E-ista Asocio, Apdo 15027, ES-08080 Barcelona, Hispanio; ☎+34/93/727-50-21)
- 09-12: 51-a Argentina Kongreso kaj 4-a Interlanda Konferenco pri Instruado, kun sesio de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Bonaero, Argentino (Carlos Gustavo Tomás, Díaz Colodrero 2546 Pb "B", AR-1431 Buenos Aires; ☎+54/1/521-71-74; ☎/773-61-59; temo: "Strategioj por eniri la ekster-Esperantan komunumon" resp. "Edukado, informado, aplikado: Bazoj por E-o en la tria jarmilo")
- 25-26: 29-a Korea Kongreso de E-o, Kyongju, Koreio (Korea E-Asocio, Kang Byeon Han Shin Core B/D N-ro 1601, Mapo-Dong 350, Mapo-ku, Seoul, Koreio; ☎+82/2/717-69-74; ☎/☎/717-69-75; <keast@soback.kornet.nm.kr>; <http://aistar.kotel.co.kr/~espero/kea>)

25-26: Enkonduko al la ludteorio, La Chaude-Fonds, Svislando (Kultura Centro E-ista, BP 779, CH-2301 La Chaude-Fonds, Svislando; ☎/✉+41/32/926-74-07; prelegas Reinhard Selten)

novembro

- 01-05: Ekonomia kaj Komerca Kunveno de E-o, Xi'an, Ĉinio (Xi'an E-Asocio, Xiyinglu 74, CN710054 Xi'an; ✉+86/29/721-80-42; <xty@xanet.edu.cn>)
- 06-08: 50-a Kultura Semajnfino, Homburg, Germanio (Sarlanda E-Ligo, Pf. 1844, DE-66468 Zweibrücken; kurso pri bahaismo kun Heinz-Dieter Maas)
- 07-09: 61-a Hokkajda kongreso de E-o, Sapporo, Japanio (Japana E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162; ☎+81/3/32-03-45-81; ✉32-03-45-82; <chb71444@pcvan.or.jp>)
- 15-17: 3-a Kolombia E-Kongreso, Medejino, Kolombio (Luis Guillermo Restrepo Rivas, Apdo Aéreo 4262, Medellín, Kolombio; ☎+57/94/265-13-41; ✉+57/4/510-07-82; <lrestre@eepm.epm.com.co>)
- 28-30: 11-a Nordorienta Renkontiĝo kaj Ceara E-Renkontiĝo, Fortaleza, Brazilo (Prof. Adelson Andrade Alves Sobrinho, Rua Waldery Uchoa, 50 - Benfica, BR-60020-110 Fortaleza - CE)
- 29-30: Ivo Lapenna (1909-1987): Liaj vivo kaj verkaro, La Chaude-Fonds, Svislando (Kultura Centro E-ista, BP 779, CH-2301 La Chaude-Fonds, Svislando; ☎/✉+41/32/926-74-07; prelegas Birthe Lapenna)

decembro

- 26-31: 5-a Togolanda E-Kongreso, Atakpame, Togolando (Unuigito Togolanda por E-o, B.P. 12096, Lomé; dekjarigo de UTE)
- 27-29: 2-a Esperanta Videofestivalo Internacia, Prago, kadre de jarĉefkunveno (28-30.) de Ĉeĥa E-Asocio (KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobříčovice; <chrldle@kava-pech.cz>)
- 27-03 jan.: 41-a Internacia Seminario, Trarbach, Germanio (Marc Stessgen, Hagedornstr. 6a, DE-51069 Köln; ☎+49/221/685-597; <a2899426@athena.rz.uni-koeln.de>; temo: "Socio kaj komunikado")
- 27-03 jan.: 14-a Internacia Festivalo, Trier, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎+49/5624/8007; ✉5624/322; temo: "Eŭropo post 1989 — Eŭropo antaŭ 1999")

1998

januaro

- 05-16: 14-a Aŭstralia Esperanta Kvin-nivela Somerlernejo, Ipswich apud Brisbano, Aŭstralio (Jay Grant, 32 Abbey St., Forestdale Q. 4118; ✉+61/7/38-00-43-12; <jgrant@gil.com.au>)

julio

- 01-08 aŭg.: 83-a Universala Kongreso de Esperanto, Montpeliero, Francio (CO de UEA, adreso en la kolofono; temo rilata al la rolo de Mediteraneo kiel kunigilo de diversaj kulturoj)

EŬROPO

Denove landa asocio en Slovakio

En Pribylina 90 delegitoj de tri regionaj E-societoj fondis la novan landan E-asocion Slovakia Esperanta Federacio (SKEF).

En la hotelo Esperanto en Pribylina renkontiĝis dum la semajnfino 31 majo – 1 junio 90 esperantistoj, delegitoj de tri regionaj E-asocioj kun entute tricento da membroj, kaj fondis novan landan E-asocion. Estis aprobitaj statuto kaj rezolucio, starigitaj novaj celoj, kaj subskribitaj du kontraktoj pri kunlaboro: kun la E-biblioteko GFB en Liptovský Mikuláš kaj kun la hotelo Esperanto, en kiu e-istoj ĝuos — ankaŭ private — rabaton de 20%. Balote oni elektis el 17 kandidatoj 5-membran estraron, kun inĝ. Juraj Gondžúr ĉefape. La sidejo de la nova asocio estos en la jam bone konata urbo Poprad sub la montaro Tatra.

Post (memvola) likvido de Slovaka E-Asocio en 1994 pro ekonomiaj malfacilaĵoj post la revolucio (SEA havis siatempe 3 000 membrojn, kaj ĝia sidejo en Poprad estis fama pro multaj brilaj E-aranĝoj), la nuntempe jam sendependa Slovakio do denove havas landan asocion, kiu reprezentos la slovakian E-movadon en kaj eksterlande.

La gazeto *Esperantisto Slovaka*, iam oficiala organo de SEA, nun aperas kiel sendependa gazeto por esperantistoj (ne nur) en Slovakio. Senpaga provnumero ĉe la redaktoro: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin, Slovakio.

Stano Marček (Slovakio)

FAKA AGADO

Sekvu la blindulan ekzemplon

Ligo Internacia de Blindaj E-istoj iniciatu konferencojn kun Esperanto kiel ĉefa, sed ne sola, laborlingvo — rekomendis la 61-a blindula kongreso (Tuusula, 1995). Tia seminario realiĝis februare en Svislando.

Dum vesperaj diskutadoj en la Tampere UK (1995) maturiĝis la ideo de blindula kongreso kies kerna lingvo estu Esperanto kaj kie interpretu lertaj blinduloj e-istaj. Forte interesata, Martin Meyer el Svislando instigis la organizaĵon Swiss Braille Watchers (SBW), promesante mem respondi pri la interpretado, aranĝi internacian seminarion (20-23 feb., Solsana/Saanan, Svislando) pri la brajla skribo.

La celo estis kunvoki el diversaj landoj uzantojn, produktantojn kaj instruistojn de brajlo, por pritrakti spertojn kaj problemojn kaŭzitajn de la aplikado de komputiloj. La signoj ankoraŭ varias en diversaj landoj (precipe la interpunkciaj), ne ekzistas tute kongrua sistemo.

La seminarion partoprenis 60 specialistoj el 13 landoj en Eŭropo, i.a. dekduo da esperantistoj. Kiel labor-

kaj preleg-lingvoj funkciis Esperanto (la ĉefa), la angla, franca kaj germana, en kiuj lingvoj aperos la dokumentoj de la seminario. Interpretis en Esperanton Martin Meyer (kiun UK-anoj konas kiel homon ludantan sian blankan bastonon), Vivian Aldridge, Rosemarie Segrada kaj Hans-Ulrich Willi (Svislando). Prelegis Jan Bemmels (Nederlando), Mats Landfors (Svedio), Norbert Müller (Germanio), Rose-Marie Lüthi Schorens (Svislando), Otto Prytz (Norvegio), Theodor Speckmann (Germanio) kaj Birger Vigen (Svedio).

La interpretado en tiu seminario montris la taŭgecon de Esperanto en praktika internacia uzado. Kial lerta, lingvoscia grupo de esperantistoj ne ofertu siajn interpretistajn servojn al aranĝantoj de internaciaj kongresoj? Sekvu la ekzemplon!

Ritva Sabelli (Finnlando)

Tre praktikaj laborgrupoj en Budapeŝto

Laŭ spertaj partoprenintoj de TEJO/KER-seminarioj, la nekutimaĵo pri la lasta seminario ("Aŭdigi niajn voĉojn", Budapeŝto, 27 apr. - 5 majo) estis ke ĝi temis pri demando tute praktika: informado.

En la Eŭropa Junulara Centro (EJC) de Budapeŝto 38 geesperantistoj (el kiuj nur 10 inoj) el 16 landoj pritraktis la tutan gamon da metodoj kaj konsideroj necesaj por "aŭdigi niajn voĉojn".

Funkciis kvar konstantaj laborgrupoj. La plej populara estis la grupo pri Interreto, kiu okupiĝis pri preparado de propra hejmpaĝo de TEJO. Tiu paĝo kaj orientoj interesiĝantojn ankoraŭ ne e-stajn kaj informados TEJO-anojn pri okazaĵoj

en Esperantujo. Kvankam en EJC mankis reta ligo, la laboro bone progresis, multaj ideoj surdiskiĝis, kaj la grupo daŭrigos sian laboron eĉ post la seminario.

Kiel kompili gazeton plej eble bele? Tiu temo estis traktita en la laborgrupo pri redaktado. Komence de la semajno eldoniĝis seminaia gazeteto unufoja, *La Tago*. En la postaj tagoj estis ekkompilita seminaia manlibro.

La grupo pri ĵurnalismo, t.e. pri verkado de artikoloj kaj gazetaraj

Kion signifas por vi Eŭropo?" ktp. La grupanoj sukcesis kompili la tri programojn, i.a. pri la temo "Kiel junaj esperantistoj diferencas de plenkreskuloj".

El la prelegoj kiuj spicis la semajnon, elstaris la prezento de Thomas Bormann pri Esperanto en novaĵ-kanalaj strukturoj. Laŭ liaj spertoj de profesia ĵurnalisto, malpli indas koncentriĝi al novaĵ-agentoj ol al kontaktoj kun lokaj kaj regionaj ĵurnalistoj, kiuj emas raporti pri E-novaĵo koncernanta ilian teritorion — kondiĉe ke temas pri vera novaĵo, ekzemple gastigo de eksterlandano aŭ renkontiĝo.

Ĉiuj ekzercis sin pri publika parolado, farante malgrandajn prelegojn de tri minutoj pri laŭplaĉa temo antaŭ vidbenda kamerao. La kolegoj poste priparolis la strukturon kaj lingvaĵon de la prelego, la gestadon de la parolanto kaj ties kontakton kun la publiko.

La seminarianojn atendis varma akcepto de mastro László Szilvási kaj de lokaj e-istoj en la Esperanto-domo, sidejo de la gazeto *Eventoj*, de Kultura E-Asocio kaj Hungara E-Junularo. La leonan parton de la surloka organizado prenis sur sin Nóra Csiszár kaj Lariko Golden: helpate de Attila Kaszás, ili sukcesis organizi ekskursojn al televidstacioj, novaĵ-agentoj kaj gazetaj redakcioj. La organizado kunordigis Saskia Idzerda, kunlaboris Vladka Chvátalová kaj Jimmy Stryhn Meyer.

Pro la sukceso de tiu ĉi seminario, nepre ankaŭ la venontaj TEJO/KER-seminarioj enhavos pli da trejnaj aspektoj. Tio certe validos por la seminario pri "Edukado al paco" (4-11 oktobro, La Chaux-de-Fonds, Svislando), kiu tre praktike aliros la demandojn kiel eblas plibonigi la kompreniĝon inter homoj el diversaj kulturoj. Informas: Marion Bélisle, Rue de la Serre 28, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando; <belisle@compuserve.com>. Por la printempo de 1998 estas planata seminario pri "Homaj rajtoj sub premo" (25 apr. – 2 majo, Vitoria/Gasteiz, Eŭskio, Hispanio).

Laŭ tekstoj verkitaĵ de la laborgrupo pri ĵurnalismo



Iom paradoksa akcesoraĵo de TEJO/KER-seminarioj: interpretado. Jen Edmund Grimley-Evans funkcias inter la angla kaj Esperanto.

Interlingvistiko en Poznań

Fariĝis pli favoraj la kondiĉoj por aliĝi al la 3-jara interlingvistika studo en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (vd. majo, p. 86). Malaltiĝis la aliĝkotizo por pagipovaj landoj (nun 400 USD) kaj plilongiĝis la aliĝperiodo: ĝis la 15-a de aŭgusto. Pluaj informoj: d-rino Ilona Koutny, Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; <ikoutny@hum.amu.edu.pl>.

Dum la unua sesio prelegos i.a. prof. John Wells pri ĝenerala kaj Esperanta fonetiko.

komunikoj, donis specialan atenton al etikaj kaj sociaj demandoj kiuj estiĝas pro novaj komunikiloj. Al tiu temo rilatis prelego de András Nyírő, ĉefredaktoro de la hungara komputil-reta gazeto *Internetto*, kiu prezentis sian novspecan magazinon: ĝi ne ekzistas surpapere, sed donas tute novajn eblojn de interagado al la legantoj.

La ĉefa celo de la laborgrupo pri radio, en kiu membris kaj aŭskultantoj kaj produktantoj de elsendoj, estis prepari tri programojn pri ni por la hungara ŝtata radio. Ĝiaj anoj aperadis subite kvazaŭ de nenie, ŝovante mikrofonaĵon sub ĉies nazon: "Ĉu esperantistoj estas normalaj gejunuloj?"

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado

Numero 14



Ĉi-foje mi proponas iom pli teoriantan numeron ol kutime, ĉefe dank' al la reagigaj artikoloj de

László Szilvási kaj Bernard Golden pri nia propagandmaniero. Indas substreki ke mi ne nepre subtenas ĉion kion ili diras: Golden prave emfazas la gravecon de stilo, sed oni povas dubi ĉu vere la plej trafa modelo por ni estas mormonoj kaj diversaj sektanoj.

Enestas ankaŭ konkretaj novaĵoj pri diversaj sukcesoj, kaj mi esperas ricevi eĉ pli da tiaj por la venonta Influo, ĉar mi certas ke multe pli valoras al ni ĉiuj praktikaj informoj pri agoj (kaj ne nur kio okazis, sed ankaŭ kiel oni sukcesis okazigi ĝin) ol ĝeneralaj proponoj kaj kritikoj. Teoristoj kaj teorioj ne malabundas jam en Esperantio.

Geoffrey Greatrex

rimedoj/materialoj

Albanio: Traduko de Fenomeno

Bardhyl Mezini faris iom mallongigitan tradukon de *La fenomeno Esperanto* de William Auld, por multobligo kaj dissendo al diversaj enlandaj edukaj organoj kaj ĵurnaloj. La albana ILEI-sekcio bonvenigas ĉiajn verkojn kiuj pritraktas la diversajn aspektojn de la internacia lingvo cele al pli efika proponado pri kaj por Esperanto. (B. Mezini).

Senpaga reklamo? — Dependas de vi!

En Hungario estas pluraj movadaj E-centroj, kiuj kunagordas sian agadon en jaraj konferencoj ("Ronda Tablo"). La laste okazinta kunveno, en aprilo, traktis interalie pri "Senpaga reklamo" — temo interesa ankaŭ por alilandaj esperantistoj.

Sen reklamo ni mortos!

En la lastaj jaroj reklamado (parto de merkotiko) iĝis aparta scienco, ĝi eksplode plimultiĝas kaj uzas ĉiam pli agresajn metodojn por kapti la atenton de klientoj. Estas klare ke se ni rezignas pri reklamado, ni perdas eĉ la esperon diskonigi la ekziston de Esperanto (por ne paroli pri ĝia plia sukcesigo). Tamen la reklamado en amaskomunikiloj (unu el la plej efikaj metodoj) kostas grandajn sumojn — kiujn la E-organizaĵoj simple ne havas. Tial multaj personoj kaj organizaĵoj ne okupiĝas pri reklamado, opiniante ke aliaj metodoj ol la multekostaj ne ekzistas aŭ ne estas efikaj. Rezulte, en la ekstera mondo pli kaj pli formiĝas la erara opinio ke Esperanto formortis. (Sufiĉas nur mencii la mankon de reklamiloj lige al E-aranĝoj, eĉ al UK. . .)

Ekzistas pliaj ebloj

Informi pri la ekzisto de nia lingvo oni povas ne nur per radia kaj televida reklamado, sed ankaŭ per multaj aliaj metodoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ senpagaj aŭ tre malmultekostaj. Ilia sistema uzo povas multege helpi al favora transformo de la publika bildo pri Esperanto: indas do provi listigi tiujn metodojn.

Insigno

Plej elementa eblo estas la konstanta portado de E-insigno (ne gravas kia, ĉu tradicia aŭ moderna). Multaj ne faras tion, simple ĉar ne estas kutimo. Aliflanke multaj grandaj (eĉ internaciaj) entreprenoj devigas siajn manaĝerojn al tio, kaj ankaŭ iliaj laboristoj plezure portas insignon. Se vi respondas ke vi ne pretas porti la E-insignon, tio signifas ke vi hontas publike montri vian esperantistecon. Ne diru ke vi ne havas aŭ ke via libroservo ne vendas insignon! Ne necesas pretekstoj — solvu la aferon! Viaj E-konatoj certe povas helpi, kaj ankaŭ en multaj E-aranĝoj oni vendas insignojn. Mi vidis pli ol 100 diversajn. . .

Loĝej-tabulo

Alia eblo estas meti malgrandan tabulon (kun aspekto laŭ via gusto) apud la pordon de via domo/loĝejo. La enhavo povas varii, gravas nur ke aperu la vorto "Esperanto". Se vi estas delegito, vi povas mencii tion sur tabuleto kvazaŭ vian titolon. Necesas loki la tabulon kompreneble tiel ke la preterpasantoj povu vidi ĝin. (En pluretaĝaj domoj ekz. sur la teretaĝa leterkesto.)

Telefonaj ludoj

En multaj programoj de radio kaj televido oni ebligas altelefonadon de aŭskultantoj. Kuraĝu partopreni ankaŭ vi! Dum via parolo menciu vian esperantistecon aŭ Esperanton, aŭ elektu iun ligitan temon, kiel lingva imperiismo, lingva egalrajteco ktp.

Redaktoro: Geoffrey Greatrex, The Highlands, Great Doward, Symonds Yat, Herefordshire, Britio HR9 6DY; greatrexgb@cardiff.ac.uk **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; [+31 10 436 1044](tel:+31104361044); [+31 10 436 1751](tel:+31104361751); uea@inter.nl.net

Senpagaj telefonnumeroj: Aldona noto

Mi kun intereso legis pri senkosta telefonnumero en la marta *Influo*. Mi miris ke oni invitis meti tiun numeron en "ĉiujn nord-amerikajn varbilojn", kvankam "la numero validas nur usone".

Nu, mi ĵus telefonis el Montrealo, kaj funkciis. Sekve, plej verŝajne la numero validas ankaŭ por tuta Kanado. Laŭ mi, ELNA devus aranĝi ion kun E-Societo Kebekia (kaj mi informas ankaŭ Kanadan E-Asocion, kiu agos laŭ sia plaĉo), okaze ke vokos iu el Kebekio, trovinte (aŭ provante) tiun numeron.

Sylvain Auclair

Irano: Alireblaj kursoj abundas

Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO) komencis novan periodon rilate la naciajn amaskomunikilojn. Antaŭ nelonge ĝi lanĉis korespondan E-kurson, al kiu la publiko arde reagis, kaj daŭre aliĝas novuloj. En nacia komputila reto kun pli ol 3000 klientoj IREJO starigis E-rondon: ĉiuj interesatoj povas atingi informojn en la persa pri E-o kaj ĉiusemajne refreŝigatajn novaĵojn pri E-o kaj E-kursoj. IREJO jam de tri jaroj daŭre aranĝas en ŝtataj kulturcentroj E-kursojn, kiuj konsiderinde helpas kreskigi ĝian membronombron. (M. Reza Torabi).

amaskomunikiloj

Aŭstrio: Rebat-servo

De 12 jaroj funkcias en Aŭstrio la rebat-servo "Tuj kaj mallonge". Se aperas en iu gazeto artikolo pri lingva problemo, pri aŭ kontraŭ Esperanto, la kunordiganto sendas kopion al duko da kunlaborantoj, kiuj mem skribas tuj mallongan leteron de leganto al la koncerna redakcio. La ĝisnuna sperto estas kuraĝiga: ĉ. duono de la leteroj fakte aperas. Pliaj kunlaborantoj el la germanlingvaj landoj estas daŭre serĉataj de la kunordiganto: Mag. Walter Klag, Rudolfiner-gasse 8/11-12, AT-1190 Wien, Aŭstrio.

Rusio: Radio

La 14-an de majo, en kurtunda hispanlingva elsendo al Latin-Ameriko, Moskva Radio Internacia kelkminute raportis pri "Esperanto, la idiomo sen landlimoj", informante ĝenerale pri la lingvo kaj pri ties kluboj en Moskvo. La raporto inkluzivis intervjueton kun moskva klub-aktivulo kaj eĉ kanzonon de Ĵomart kaj Nataŝa. (R. M. Ferreira).

Nederlando: Televido

La 3-an de majo la Amsterdama televido donis 10 vesperajn minutojn al Mark Overman kaj David van Bezooijen, aktivuloj de Nederlanda E-Junularo. Ili pledis por egalrajteco de eŭropaj lingvoj, varbis por kursoj, aŭdigi E-parolon kaj -muzikon. (*Fen-X*)

Skotlando: Radio

Kvar gael-lingvanoj laborantaj aŭ -intaj eksterlande debatis telefone pri la temo ➔

Afiŝtabuloj

En multaj laborejoj kaj ankaŭ en lernejoj, universitatoj ekzistas publikaj murtabuloj por afiŝado. Pendigu taŭgan materialon — mallongan sed atentokaptan kaj belaspektan!

Anonc-gazetoj

En multaj landoj ekzistas gazetoj kiuj publikigas privatajn aŭ komercajn anoncetojn de legantoj (ekz. pri loĝej- kaj aŭto-vendo, instruado, labor-oferto). Plejparte ili postulas por tiuj anoncoj malgrandajn sumojn aŭ neniom. Tiujn gazetojn legas multaj homoj, do indas aperigi anoncetojn pri E-instruado, kunveno de E-klubo. Estas pardonebla kulpo se iu aperigas eĉ "ne tre verajn" anoncojn. (Ekz. serĉado de nova dungito kun nepre E-lingvoscio aŭ simile. . . — dependas nur de via fantazio.)

Gazetartikoloj

Multaj gazetoj aperigas leterojn de legantoj. Al tre multaj temoj oni povas rilatigi lingvajn aferojn (NATO, Eŭropo, Eŭropa Unio, komputiloj, tekniko, laborlokoj, turismo ktp.). Via eventuala letero ne nepre devas paroli pri E-o, sed ĝi povas levi la problemon de lingva samrajteco kaj nur flanke mencii Esperanton. Krom tiaj leteroj vi povas ankaŭ skribi al rubrikestroj kaj proponi la traktadon de tiuj temoj en la gazeto.

Konkurs-alvokoj

En multaj landoj ekzistas gazetoj, eldonaĵoj kiuj informas pri konkursoj kaj projektoj (ne nepre implicantaj grandajn sumojn) de diversaj fondaĵoj kaj pri akireblo de diversaj subvencioj. Tiujn eldonaĵojn legas gvidantoj kaj aktivuloj de multaj societoj, kaj ofte la lokaj aŭ regionaj radio- kaj televid-stacioj publikigas ilin senpage. Ankaŭ via loka klubo (aŭ prefere E-societo) povas aperigi (kutime senpage) alvokon pri iu konkurso de E-verkoj, eseoj, video-verkoj ktp. Foje okazas ke "pro la nekontenta kvalito" oni ne aljuĝas premion. . .

Se via loka asocio aŭ klubo povas produkti glumarkojn (paperajn aŭ plastajn), vi povas glui ilin sur vian aŭtomobilon kaj sur diversajn objektojn. Mi povas imagi ankaŭ agadgrupon kiu gluas tiajn foliojn sur anglalingvan afiŝon, postulante la uzon de nacia lingvo.

Vojaĝoj

Se vi kontaktas eksterlandanon (telefone, persone aŭ dum turisma vojaĝo), unue provu uzi la Internacian Lingvon! Aspektas tute seniluziige se ankaŭ esperantistoj mem rezignas pri la uzo de nia lingvo en restoracioj, hoteloj, muzeoj kaj tuj komencas per la demando: *Do you speak English?* Estu evidente ke unue vi provas Esperanton!



Germanio: Glumarko

Ĉi tiu nova glumarko de Germana Esperanto-Junularo, je bildkarta grandeco, baziĝas sur dezajno de Tania Berger el Vieno, kiu reagis al konkurso anoncita en *GEJ-Gazeto*.

Demandoj pri E-versio

En pluraj landoj oni sendas al via adreso senpagajn reklam-gazetojn. En tiuj eldonaĵoj ofte aperas ofertoj pri produktoj/servoj kun lingva rilato (ekz. diversfakaj vortaroj plurlingvaj, KD-ROM-oj, eĉ parolantaj kalkuliloj kaj aliaj aparatoj). Skribu al la eldonejoj demandante pri Esperantlingva versio! Tio montras al ili ke ekzistas deziro havi tiajn eldonaĵojn (des pli, se vi mencias ke eble la koncerna produkto povas esti utiligata/vendata ankaŭ internacie). Ne forgesu ke demandoj pri la ekzisto de varo ankoraŭ ne devigas vin aĉeti ĝin!

Surstrataj tabuloj

En multaj landoj estas kutimo meti sur straton reklamtabulojn pri produktoj de proksima vendejo. Ofte tiuj tabuloj estas ne-oficialaj (oni ne pagas pro tiu uzo de la publika spaco), sed multegaj preterpasantoj ĵetas rigardon al ili. Tia tabulo (el malmultekosta materialo, kiel kartono aŭ plasto) kun reklama slogano, metita en trafikplanan lokon (metroa enirejo, trotuaro ktp) povas akiri signifan publikecon. Eble jam post kelkaj horoj aŭ tagoj oni forigas ĝin, sed ripeto ne kostas grandan sumon. Oni povas ankaŭ legalizi ĝin — se estas disponebla sumo por tiu celo.

Murtabuloj

Multaj esperantistoj loĝas apud trafikplenaj vojoj. Kial ne pendigi grandan tabulon sur muron aŭ sur barilon kun reklamo pri Esperanto? Tia reklamo kostas malmulte, sed estas longtempe vidata de preterpasantaj ŝoforoj. Tamen, ĝi devas aspekti okulfrappe kaj bele! En la ĉirkaŭaĵo oni nomas la straton de nia redaktejo “strato Esperanto”, ĉar tia tabulo, pendigita de ni, estas pli granda ol la tabulo kun la stratnomo. Imagu la efikon, se multaj esperantistoj farus simile!

Fieru esti esperantisto!

Mi emfazas ke konsciigo pri la ekzisto de Esperanto estas nia baza postulo. Se vi atendas ĉion de la estraro de via landa asocio, vi mem fosas la tombon por nia ideo. Agu mem, kaj instigu agi aliajn! Estu fiera pri via esperantisteco!

László Szilvási (el Interredaktore)

Rim.: Ĉar la supraj ideoj estas realigeblaj ankaŭ de subtenantaj membroj, ni proponas traduki la supran tekston al naciaj lingvoj kaj diskonigi ĝin en viaj movadaj komunikiloj nacilingvaj.

Propagandaj mispaŝoj surstrate

Malofte prikomentitaj misvoj de la E-propagando

En diskutoj pri strategio kaj taktikoj grava temo devas esti la malkonvenaj manieroj prezenti Esperanton al la publiko. Partoprenantoj estas jen fizike malbelaspektaj, jen netaŭge vestitaj, jen prenantaj pozojn ridindajn aŭ timigajn. Ĉio ĉi malseriozigas ilian agadon kaj servas por forpuŝi homojn anstataŭ ilin altiri. Unu el la plej oftaj plendoj estas kontraŭ tro multaj maljunaj grizharuloj kiuj montras sin propagandcele antaŭ la publiko.

Mia atento pri tiu ĉi situacio estis lastatempe altirita de pluraj fotografaĵoj en la gazetaro. En tiu ĉi artikolo mi kritikos la agadon de surstrataj aktivuloj, inter kiuj estas rimarkebla manko de junaj, belaspektaj homoj, almenaŭ en la fotoj kiujn mi sukcesis trovi. Rigardante la bildon de surstrata semajnfina aranĝo en Berkeley, Kalifornio (feb., p. 22), mi tuj demandis min laŭ kiuj kriterioj la funkciuloj de la tiea Esperanto-organizaĵo permesis ĝuste al tiuj du “sindediĉaj” uloj reprezenti Esperanton en publika loko? Ĉu inter la esperantistoj de la menciita urbo ne estas troveblaj kelkaj junulinoj, kiuj povus pliagrabligi la kontakt-situacion kun la publiko? Komparu la multe pli favorajn impresojn kiujn kreas sur la komerca tereno demonstrantinoj senditaj de firmaoj al diversaj lokoj por propagandi kaj prezenti varojn. Evidentas ke ili estas tre zorge selektitaj por entrepreni tiun laboron: pimpaj junulinoj, portantaj minijupon, kun alloga hararanĝo kaj delikate ŝminkita vizaĝo, sur kiu ĉiam radias tre simpatia rideto. Kiu povas rezisti al ilia magnetita altirpovo? Oni ja volonte aŭskultas kion ili diras, kaj rigardas la demonstritajn artiklojn kiujn ili proponas. En Esperantujo, bedaŭrinde, korpulentaj kalvuloj kaj mezaĝaj matronoj, eĉ se ĉirkaŭitaj de verdaj flagoj kaj steloj, ne kapablas krei ĝuindan atrakcion.



“Unu lingvo por Eŭropo?” ĉe radio en Stornoway, en junio. Ana NicLeoid, plurlingva skotino, parolis pri plurlingveco en Albanio kaj la kreskanta influo de la angla en tiu lando, precipe inter gejunuloj. Niall Mitcheson, gaela verkisto loĝanta en Italio, traktis lingvajn problemojn en Eŭropa Parlamento. Garbhan MacAoidh, esperantisto el Irlando, proponis Esperanton kiel solvon de tiaj problemoj. (G. MacAoidh)

Ĉeĥio: Radio, gazetoj

La 11-an de aprilo en la trihora elsendo “Bonan matenon” de Radio Praha II gastis Ivo Železný, dumviva membro de UEA kaj posedanto de la plej granda libroeldonejo en Prago. Li deklaris sin esperantisto kaj diris ke Esperanto estas la sola vivanta lingvo el la planlingvaj projektoj, kaj ke ĝia kultura agado egalas al tiu de unumilionacia nacio. (Ĉi tiu estas unu el la lastaj informoj kiujn sendis al la revuo *Starto* Jaroslav Mařík — vd. nekrologon en jun., p. 120.)

En 1996 la komisiono por informado de Ĉeĥa E-Asocio kolektis 305 gazet-eltondaĵojn rilate E-on, inter kiuj 171 estis artikoloj. 137 el la materialoj rilatis al la Praga UK. (*Starto*)

Pollando: Du intervjuoj

La 4-an de aprilo, je la 38-a datreveno de la E-elsendoj de Pola Radio, ĉi ties Pola Redakcio (elsendanta por eksterlandaj poloj) prezentis tri fojojn 10-minutajn intervjuojn kun Andrzej Pettyn pri Esperanto en radio kaj ĝia uzo por internaci-skala informado. Ĉi tiu intervjuo altiris la atenton de Televido Polonia, elsendanta ĉefe al eksterlando, kiu invitis Pettyn al rekt-elsenda, 10-minuta interparolo pri Esperanto la 13-an de aprilo, tuj antaŭ unu el la plej popularaj programoj de la stacio. (A. Pettyn)

Slovakio: Revuo

En Trenčín ekde 1992 regule aperas en la regiona monata revuo *Považie* rubriko pri movadaj novaĵoj slovakiaj kaj eksterlandaj, prizorgata unue de Janko Lamačka kaj post lia morto de Ivan Slávik, redaktoro de *Považie*. (*E-isto Slovaka*)

Hungario: Opini-artikolo

“(Komuna) lingvo por Eŭropo; La plej bona pontolingvo por la unio estus Esperanto” — kvaronpaĝa artikolo de László Gados (24 feb.) aperis sur opini-paĝo de la plej legata ĵurnalo de Hungario, *Népszabadság*.

Bharato: Gazeto, radio, televido

La Bangalora ĵurnalo *The Asian Age* (1 marto) enhavis informan artikolon pri Esperanto, en kiu la sekretario de la loka E-centro, S.S. Pradhan, respondis diversajn demandojn pri la lingvo.

A.K. Nandi kaj Syamsundar Pal (Federacio Esperanto de Bharato) prezentis la 18-an de januaro duhoran programon pri Esperanto ĉe Kalkuta FM-radio.

La nacia televidkanalo Doordarshan elsendis pasintjare du programojn pri Esperanto: la unua, 20-minuta, temis pri la origino kaj ecoj de la lingvo, la dua, 25-minuta, demonstris la facilecon de Esperanto kaj parolis pri Zamenhof. (*Fenestro*)

Francio: Radio

La multeco de mesaĝoj de e-istoj kiujn ricevis elsendo de la radio France Inter pri "konstruado de Eŭropo" (marto, p. 49), estis dankebla al vasta antaŭsciigado pri la programo fare de la Rebato-Servo de SAT-Amikaro, informita de Yves Nicolas. La mesaĝoj estis tiom multnombraj ke la faksilo ĉe la radio paneis pro manko de papero, kaj la programestro parolis, iom ŝerce, pri "prem-grupo". (SAT-Amikaro)

Kebekio: Artikolo venigas televidon

Dupaĝa favora artikolo en la revuo *Dernière Heure* (12 apr.) pri la Montreala E-familio Metz-Fleury, kun la du denaskuloj Mira kaj Damir, vekis tian intereson ke venis ankaŭ televido por fari raporton pri la familio. La 8-an de junio elsendiĝis 3-minuta ero ĉe la stacio Quatre Saisons, transprenota de la internacia franclingva kanalo TV5 por dissendo en Ameriko.

Britio: Reaĝoj

Kiel raportite en majo (p. 98-99), la itala eŭrodeputito Riccardo Nencini prezentis al la Eŭropa Komisiono skriban demandon pri "komuna lingvo por Eŭropo". Pri tiu demando la britaj amaskomunikiloj raportis grand-skale komence de junio 1997. Artikoloj aperis en dudeko da lokaj kaj regionaj ĵurnaloj kaj en prestiĝaj ĵurnaloj kiel *The Times* kaj *The Guardian*. Dum kelkaj raportoj estis objektivaj, pluraj el la aperintaj artikoloj estis negativaj aŭ mokaj, sed tio donis bonan okazon al britaj esperantistoj reagi. Lokaj kaj regionaj radio-stacioj de BBC intervjuis esperantistojn pri la demando. La kimralingva servo de BBC volis eltrovi de Hilary Chapman ĉu Esperanto celas preni la lokon de minoritataj lingvoj. (H. Chapman)

aplikado

Eŭropo:

Esplorroboto komprenas Esperanton

Uzantoj de la esplorroboto EuroSeek, la eŭropa alternativo al la usonaj esplorrobotoj Altavista, Lycos kaj Yahoo!, povas elekti el 40 lingvoj, de la bretona ĝis la turka, nun ankaŭ Esperanton. Oni povas indiki la preferojn de sia esploro (vorton, nomon aŭ frazeron) kaj ricevi raporton pri la trovitaĵoj en Esperanto. Ankaŭ la ceteraj partoj estas esperantigitaj, ekz. la tekstoj kiuj klarigas la funkciadon. Sed ne ĉio estas en Esperanto. Aperas sur la diversaj paĝoj anglalingvaj anoncoj kaj tekstoj, kiuj estas komunaj por la diverslingvaj variantoj.

Eblas serĉi dosierojn en specifa lingvo aŭ lando, sed kaze de laŭlingva serĉo povas esti konsiderataj nur dosieroj kiuj informas pri lingvo en sia "kapo", do por Esperanto komenciĝas per <HTML lang="eo". EuroSeek indeksis ĝis nun la enhavon de 8 milionoj da TTT-dosieroj, sed atingos dum la venontaj monatoj 30 milionojn. Nur post tiu ampleksigo la raportado pri E-dosieroj estos fidinda. EuroSeek estas atingebla de kie ajn en la mondo: <http://euroseek.net>. (F. Luin, <franko@esperanto.se>).

Ekstercirkaj klaŭnoj

Surstrata apero de klaŭnoj ĉiam estas sensacio kaj neeviteble altiras amasojn da homoj, kaj junaj kaj grandaĝaj. Ankaŭ la Esperanto-komunumo havas siajn



verdajn pajacojn, kvankam ili mem certe ne agnoskas tiun rolon. Du fotografiaĵoj en mia kolekto montras kiel estis sukcese kreita cirka etoso surstrate. La unua foto montras scenon de Ago-Tago en Bruselo en 1992 (nov. 1992, p. 183). Naŭ plejparte plenkreskaj kaj maljunaj aktivuloj, starante sub verda standardo, portis surbruste po unu tabulon kun granda litero. Kiam ili ĝuste envicigis, la

literoj formis la vorton "ESPERANTO". Kia ludo por tiuj bubegoj! Tiumaniere infanoj en lernejoj lernas la alfabeton. Mi ne scias ĉu la naŭ klaŭnoj montris aliajn trukojn per siaj aboco-kartoj, ekzemple kreante novajn vortojn per ŝanĝo de sia vicordo sur la trotuaro.

Demonstracioj kaj manifestacioj

Pli dramecajn surstratajn propagandajn agadojn faras marŝantaj bandoj da verdsteluloj, portantaj flagrubandojn kaj afiŝojn sur stangoj. En 1992 relative trankvila grupo de proks. 50 homoj iradis sur stratoj en Tuluzo, Francio, cele



al la sidejoj de televid-stacio kaj ĵurnalo (nov. 1992, p. 182), kiam estis portataj pluraj dulingvaj, grandformataj rubandoj. Ĝuste la amase partoprenataj agadoj povas havi negativan rezulton kaj forpuŝi la publikon, kiu kutimas vidi en tiaj demonstracioj rabiajn radikalulojn kaj protestantajn politikistojn, gvidatajn de profesiaj tumult-incidentoj, kiuj celas agiti la popolon per violenta

Kriado de siaj kliŝaj sloganoj

Tian publikan bildon pri esperantistoj oni devas eviti je ĉiu kosto. Eĉ publikigitaj ilustraĵoj pri tiuj eventoj povas misefiki, ĉar estas sciata ke unu bildo diras pli ol mil vortoj — eble ne nur por sed ankaŭ kontraŭ Esperanto.

Graveco de bona stilo por surstrata propagando

Ekzamenado de ĉiuj elementoj rilatantaj al surstrataj kontaktoj kun la publiko devas konduki al starigo de gvidaj principoj; temas pri tio kion plej konvenas fari kaj kio povas havi malfavorajn sekvojn. Miaopinio, la ŝlosila koncepto ĉi-rilate estas stilo. La membroj de la Esperanto-movado kiuj entreprenas publikan propagandadon, devas evoluigi sian propran stilon, kiu faras ilin kaj ilian movadon facile identigeblaj en pozitiva maniero.

Jam de longe mi observis kiel la koncepto de stilo estas aplikita al la propaganda agado de membroj de religia organizaĵo. Temas pri mormonaj misiistoj, kiuj aperas surstrate preskaŭ ĉie en la mondo kaj agadas sammaniere. Ilin karakterizas ĝis eminenta grado unika kaj propra stilo. Ĝiaj ĉefaj trajtoj estas juneco, fizika bonaspekto, sobra konduto, formalaj vestoj kaj, plej grave, sincera vizaĝ-al-vizaĝa interparolado por naski reciproke konfidon. Kiel reagas konsumantoj de la varo "Esperanto"? Ĉu altiras ilin al aĉetado aŭ investado huliganecaj homtipoj, kies kondut-maniĝo estas plebe vulgara, emocie ekscita kaj brue bombasta? Aŭ ĉu ili prefere volas interrilati kun allogaj, junaj homoj kun ĝentilmana edukado, kiuj agas trankvile, ĝentile, rafine kaj serioze por inspiri entuziasmon kaj respekton? Evidente, estas demando pri stilo.

Bernard Golden (Hungario)

Ĉu ŝanĝi la statuton?

Komisiite de la prezidanto de la Akademio esplori pri la neceso de ŝanĝoj en ties statuto, akademiano François Lo Jacomo konigas al ni pasiigajn debaterojn.

Triono el la akademianoj respondis al la tripaĝa cirkulero kiun mi sendis en pasinta aŭgusto pri necesaj statutŝanĝoj. Pri tiuj respondoj mi raportis al la prezidanto kaj ĝenerala sekretario, en februaro 1997, per sepaĝa teksto, kiu instigu al plua debato pri la statuto kaj pli ĝenerale pri la strukturo de nia institucio: sur tiu ĉi kampo ne indas tro haste decidi.

Fakte la demando estas pluraspekta: Ĉu la Akademio havu *juran personecon*, por malpli dependi de aliaj komponantoj de la E-movado? Pri tiu ĉi demando okazis aparta balotado, kaj fakte malmultaj pritraktis tion responde al mia cirkulero, en kiu mi tamen menciis la problemon. Estas klare ke sen statutŝanĝo la Akademio ne povus akiri juran personecon, sed sufiĉas malgranda statutŝanĝo — i.a. mencio de la sidejo — por ke tio eblu. Necesus ja decidi kie estu la sidejo — ni ankoraŭ ne oficiale tuŝis tiun ĉi demandon —, ĉar per pli-malpli la samaj statutŝanĝoj ni fariĝus asocio registrebla en pluraj landoj. [En cirkulero prezidanto Werner Bormann resumas jene la kialojn de bezono je jura personeco: “a) pro prestiĝaj kaŭzoj (asocio jure neekzistanta ne povas partneri al analogaj nacilingvaj institucioj, universitatoj ktp.), b) pro financaj kaŭzoj, ĉar sen jura personeco ne eblas ricevi testamentajn legacojn, subvenciojn de neesperantistaj institucioj ktp., c) por gardi la propran ekskluzivecon en Esperantio; kiu ajn hodiaŭ povas fondi asocion kaj nomi ĝin ‘Akademio de Esperanto’.” —Red.]

Ĉu necesas *korekti mankojn* aŭ troigojn en la nuna statuto de la Akademio? La artikolo 27: “Ĉiujare la kontoj de la Akademio estas publikigataj en la Jarlibro de UEA” evidente ne funkcias. Sed la artikolon 15, laŭ kiu la Ĝenerala Sekretario-Kasisto estu “se eble salajrata”, Humphrey Tonkin proponas lasi senŝanĝa, klarigante: “la fakto, ke mankas mono por salajroj, ne forigas la dezirindon havi ĝin.” Fakte pri tiaj troigoj formala statutŝanĝo ne konkrete ŝanĝus la efektivan

funkciadon de la Akademio. Eĉ mankojn oni povus ripari sen statutŝanĝo.

Plej gravas ke estu sufiĉa interkonsento inter la membroj de nia institucio: pluraj (i.a. mi) plendis pro la malbona proceduro en kelkaj akademiaj elektoj, sed plibonigo de elekto-proceduro ne rekte dependas de la statuto. Perla Ari-Martinelli proponas ke nia statuto difinu minimuman aĝon por kandidati al la Akademio, sed eĉ la franca akademio, kies membroj aĝas meze pli ol 75 jarojn, ne havas tian regulon: la plej juna franca akademiano estis 16-jara. Ĉiuj elektantoj precize scias pri la aĝo de la kandidato kaj povas mem decidi ĉu tiu estas tro juna por esti elektita. Tonkin rekomendas “ke ni formu konstantan komisionon pri membreco, kun tasko daŭre serĉi taŭgajn kandidatojn [...] kaj fari rekomendojn al la Akademianoj”, kaj Gerrit Berveling proponas ke “minimume unu triono de la Akademio konsistu el virinoj”: ĉu ni atendu statutŝanĝon por tio? Multon ni tuj povas plibonigi kun la nuna statuto, kaj se estas internaj konfliktoj pri kelkaj punktoj, mi ne certas ke statutŝanĝo estas la plej taŭga maniero solvi ilin.

Ŝanĝo statuta kaj struktura

Kaj fakte la deziro ŝanĝi la statuton, krom ĝia unua aspekto pri sidejo kaj jura personeco, kongruas kun la pli vasta deziro plibonigi la entutan strukturon de la Akademio. Venis interalie demando ĉu daŭre la akademianoj elektu novajn akademianojn aŭ ĉu oni plivastigu la elektantaron aŭ proponantaron. Ĉu la taskoj listigitaj en la statuto estas daŭre aktualaj? Ekzemple pri la frazo “La Akademio defendas Esperanton kontraŭ konkurencaj sistemoj de lingvo internacia” Michel Duc Goninaz komentas: “La nocio *defendo*, kiu implicas la nocion *atako*, estas malfacile difinebla. Kiel kaj kiom la ekzisto de Interlingua aŭ Ido atakas E-on? (...) Se la Akademio devus defendi E-on kontraŭ la stultaĵoj de multaj e-istaj propagandistoj, ĝi nur per tio havus kolosan laboron.”


Neeviteble, la demando pri statutŝanĝo kondukas nin al la demando pri efektiva rolo de la Akademio. Kaj tio apartenas al pli vasta debato pri la lingvopolitiko de la Esperanto-movado, en kiu partoprenas ne nur la Akademio, sed pli ol cent kromaj lingvaj institucioj. Kadre de tiu ĉi debato, mi ŝatus proponi jenajn demandojn: ĉu la Akademio estu profesia aŭ amatora instanco? Se ĝi estu profesia, ĝi donu al si la rimedojn por tio, administrante monon por financi esplorprojektojn aŭ aljuĝi premiojn. Se ĝi funkcii kiel leĝodonanto, ĝi nepre estu apogata de ekzekutivo, sen kiu iu ajn leĝo fariĝus senutila babilaĵo. Se ĝi estu amatora instanco, kio por mi tute ne estas senvoloriga kvalifiko (mi mem multe laboras kiel amatora matematikisto), ĝi donu al si la aspekton de tio, ne tropezigante sin per decid-strukturo kiun ĝi ne plene regus. Kaj estas esence interkonsenti pri la fundamenta demando: ĉu en la nuna E-movado la esperantistoj ja volas paroli la saman lingvon aŭ ne? Se ne, la Akademio povas funkcii kiel juĝinstanco, decidante ke se 60% el ĝiaj membroj opinias tiel kaj 40% alie, nur la unua eblo fariĝu la oficiala Esperanto. Sed se la esperantistoj ja volas paroli la saman lingvon, la Akademio estu esence *modelo* pruvanta ke kleraj homoj kun plej diversaj denaskaj lingvoj ja parolas la saman lingvon, eĉ se ili esprimas plej diversajn opiniojn per kaj pri tiu ĉi lingvo.

Ĉi tiuj demandoj fakte ne plu koncernas statuton, sed ĉu oni pristudu ilin antaŭ ol tuŝi la tiun, aŭ ĉu oni unue ŝanĝu la statuton? Legantoj reagu!

François Lo Jacomo (Francio)

Akademianj elektoj

La Akademio ĉiun trian jaron renovigas per alekto trionon de siaj membroj (15 el 45). Sekvan fojon tio okazos en 1998. Por kandidatiĝi, oni devas esti proponita de minimume kvin akademianoj, kiuj reprezentu almenaŭ tri malsamajn lingvojn. Tamen ĉiu e-isto konscia pri la kvalitoj de iu alia povas rekomendi tiun al la Akademia Estraro, antaŭ la fino de septembro 1997: Pf. 28, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. (Heroldo)



Mapo de interna aventuro

L'homme qui a défié Babel. Ludwik Lejzer Zamenhof. René Centassi, Henri Masson. Antaŭparolo de Louis C. Zaleski-Zamenhof. Franclingva. Paris: Ramsay, 1995. 401p. 23cm. 49,50 gld.


Iuj vivoj, tumultaj kaj eventoplenaj, estas vera frandaĵo por la biografoj. En aliaj vivoj, male, la aventuroj estas internaj. Ĉi tiel okazas ĉe la mistikuloj kaj ĉe iuj filozofoj: ilia materia vivo estas tiel subtila ke ĝi ne rakontebblas, ne estas biografiebla. Zamenhof eble apartenas al tria kategorio, meza inter la du antaŭaj: vivante ŝajne sufiĉe seninteresan kaj rutinan vivon, dediĉitan esence al laboro, dume li vivigis kaj kunvigligis movadon eksterordinaran, plenan je vivo, je esperoj kaj pasioj, movadon kiu lin superkreskis kaj glorigas. Probable tio kaŭzas la paradokson ke ĉi tiu verko, kvankam ĝi prezentiĝas kiel biografio de Zamenhof, donas fakte multe pli da informo pri la historio de la Esperanto-movado ol pri la persona vivo de ĝia fondinto.

De Zamenhof mem la libro malkovrigas al la leganto precipe tiujn viverojn kaj personajn aspektojn kiuj rilatas al Esperanto (aŭ al la homarismo, kiu ĉi tie aperas kiel ia natura daŭrigo de Esperanto). La rakonto de liaj infaneco kaj junaĝo strukturiĝas do, tradicie, ĉirkaŭ la iom-post-ioma ekesto de la lingvo internacia, ekde la impulso-dona Bjalistoka foirplaco ĝis la oficiala naskiĝo, la 26-an de julio 1887, kiam publikiĝis la *Unua Libro*.

Sekve, sursceniĝas amaso da rolantoj, lasante Zamenhof ofte en la fono: la atento de la aŭtoroj koncentriĝas al la naskiĝo kaj evoluo de la Esperanto-komunumo. La plej fascinanta eron de la historio de Esperanto nenegeble konstituas la unuaj etapoj de ĝia disvastiĝo, ĉi tie plej detale priskribitaj: kiel Esperanto sukcesis — dum ĉiuj similaj projektoj rompiĝis sur tiu obstaklo — transformiĝi el intelekta konstruaĵo en vivantan lingvon? Kiel sugestas la aŭtoroj, la precipa kialo serĉendas certe en la internaj karak-

terizaĵoj de la lingvo: la simpleco kaj reguleco de ĝia gramatiko kaj la naturreco de ĝia leksiko faras el ĝi ilon nekompareble superan al ĝia ĉefa konkurinto, Volapuko.

Tiuj virtoj tamen ne sufiĉas por klarigi la amplekson kaj la rapidecon



La ekzisto de ampleksa biografio de Zamenhof en vaste legata lingvo estas merito en si mem.

de ĝia sukceso, kiun atestas impresa listo de entuziasmaj aliĝoj kaj simpatideklaroj. Ĉi-rilate oni povas bedaŭri ke la aŭtoroj ne strebis evidenti aliajn klarigajn faktorojn, ekzemple montrante, post analizo de la ideologia kunteksto fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento, kiel Esperanto perfekte enkadriĝis en ĉi tiun kaj respondis — same laŭ sia formo kiel laŭ sia celado — al la atendoj de sia epoko. Tiun mankon klarigas certe la koncepto de la aŭtoroj ke Espe-

ranto estas unuavice *produkto de la logiko*, racia kaj universale valida respondado al la same universala problemo de la lingvomulteco kaj de la internacia komunikado. Tiu koncepto, kies trafecon ni nun ne pridiskutu, bedaŭrinde malhelpas ilin vidi ke Esperanto estas ankaŭ *produkto de la historio* — iom paradokse ĉe verkantoj kun historiista pretendo.

Ekde la Bulonja kongreso de 1905, la prezento strukturiĝas ĉirkaŭ detalaj raportoj pri la jar-post-jaraj Universalaj Kongresoj. Tiun elekton eble pravigas la historia realo, ĉar la kongresoj estas la kristaliĝ-punktoj de la movadaj evoluoj, sed tio foje igas la legadon iom teda. Pro la daŭra parafrizado kaj citado de paroladoj tro ofte malklariĝas la supervido al la tuto. Nenio ja pli similas al parolado ol alia parolado, ĉiu kun siaj grandaj ideoj, noblaj sentoj kaj pretaj vortumoj — tiuj de Zamenhof, malgraŭ sia tuta sincereco, ne estas escepto al tiu regulo de la ĝenro. Eblas do pridubi ĉu vere necesis tiel detale raporti pri ili.

Ĝenerale, la libro kritikindas pro siaj nekontentigaj analizoj. Same pri Zamenhof kiel pri la historio de la movado, la aŭtoroj abunde kaj detale raportas faktojn kaj eventojn — en si mem ofte intereseajn —, sed la prezentataj pritaksoj kaj interpretoj estas ofte malprofundaj kaj emas al ripetigo.

Pro tio la libro eble elrevigos la pli postulemajn legantojn, kiuj certe trovos intelekte pli kontentiga la klasikan kaj admirindan verkon de Pierre Janton [*L'espéranto*; vd. apr., p. 75 —Red.]. Estas tamen klare ke ĉi tiu biografio, aperinta ĉe ĝeneral-karakterata eldonejo, celas precipe la grandan publikon, ne lingvistojn kaj intelektulojn. Se oni konsideras tion, la relative simplaj analizoj povas aperi kiel kvalito, garantio de optimuma leg-facilo. Krome, ne maleblas ke la preskaŭ ensorĉanta ripetado de facile memoreblaj, simplaj formuloj kaj de vortoj forte emociaŝargitaj (*espero, frateco, justeco, amo* ktp) faciligas la ricevon de la mesaĝo ĉe iaj legantoj. Estas do malfacile doni absolutan juĝon pri la efikeco de la libro kiel Esperanta propagandilo, sed, kiel ajn, nepras rekoni ĝian grandegan meriton: ke ĝi ekzistas kaj igas alirebla por franglingvaj legantoj informojn kiuj grandparte ne estis ĝis nun disponeblaj en la franca lingvo.

Antoine Chalvin (Francio)

Laste aperis



Alvenis la papagoj (1996). Tibor Ébert (1926). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Debrecena Bulteno, 1997. 52p. 21cm. Kvazaŭ muzike komponita, moderna novelaro. 9,00 gld.

Bahá'í Faith and Esperanto, The. Paul Joseph Desailly (1952). [Melbourne: la aŭtoro,] 1997. 47p. 30cm. Anglalingva. Analizo de la komunaj punktoj kaj historioj de bahaismo kaj esperantismo. 18,00 gld.

Bela petveturantino, La. Ses erotikaj rakontoj. Leopold Vermeiren. El la nederlanda trad. Lode Van de Velde. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1996. 76p. ISBN 90 71205 67 3. 21cm. Tria en la serio de kvar erotikaj novelaroj, post *La nuda feino* kaj *La ludanta lumo*. 16,50 gld.

Cerbumi kaj solvi. Puzlaro. Jan Szurman. Cieszyn: la aŭtoro, 1994. 82p. 21cm. 75 krucvortengimoj. 12,00 gld.

De kie? Kien? Kaj kiel? John Adcock (1904-87). Reviziis Desmond Langman. El la angla trad. Donald Rogers. [La tradukinto: Lower Hutt, 1993]. 32p. 30cm. Pri kelkaj esencaj demandoj de la vivo. Verkita de elstara psikologo esperantista, por eduka asocio de laboristoj. 12,00 gld.

Elektitaj versaĵoj pri Międzygórze, La. Leszek Łękowski (1933). El la pola trad. Urszula Tupajka. Bydgoszcz: la aŭtoro, 1996. 14p. 21cm. 1,80 gld.

Esperantaj literoj kaj komputoroj. 9-a eldono. Komp. Jürgen Wulff. Hamburg: KompRo, 1997 (9-a eld.). 34p. 30cm. Kun disketo 3,5-cola por PC-komputiloj. Kolekto de artikoloj el informiloj de Komputila Rondo. 24,00 gld.

Falĉita kiel fojno. Krimromano. Sten Johansson. Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 76p. 21cm. La intrigo okazas en internacia kaj sveda medio, kun ingrediencoj realisme aktualaj. 12,60 gld.

Franz Schubert – Muzika albumo. Ernst A. Ekker / Doris Eisenburger. El la germana trad. Georgo Handzlik. Bielsko-Biała: KLEKS, 1997. 28p. ISBN 83 86147 76 8. 31cm. Bind. Plenkolora presita. Vivrakonto de la komponisto, por (ne nur) infanoj. Kun 60-minuta kompakta disko: pecoj speciale elektitaj por la albumo. 54,00 gld. Sen la disko: 30,00 gld.

Helpa mano. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 26p. 22cm. Aventuroj de usonaj vojaĝantoj en Hispanio en 1964. 5,40 gld.

Henriko Vikenburgo kaj Vulturo-minejo (1862-1905). Paĝoj el la historio de usona ŝtato Arizono. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1993. 12p. 22cm. 2,70 gld.


Homa flanko de homoj, La. La teorio de retaksa konsilado (1965). Harvey Jackins. El la angla trad. M. Lighthart, M.C. Sears, R. Bailey. Seattle: Rational Island

Publishers, 1972. 38p. 22cm. Teorio prezentanta solvon de "la baza problem" de la mondo: "homa neracieco". 7,80 gld.

Imitado de Kristo (1418). Thomas à Kempis (1379-1471). El la latina trad. G.F. De Ruyver. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1997. 165p. ISBN 90 71205 65 7. 21cm. La fundamenta verko de "moderna devoteco", kristana movado antaŭ-reformacia. 27,00 gld.

Interreto... inter kio? Gent/Antwerpen: Agora/Flandra E-Ligo, 1997. 15p. 21cm. Nuksoŝela enkonduko al la tutmonda komputila reto. 5,40 gld.

Korea saketaso. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 19p. 22cm.



Post longa restado en tirkesto, postmorte aperis originala epopeo de B. Tornado.

Novelo pri la stranga sorto de taso ŝtelita en Koreio, en 1946. 3,90 gld.

Londono-ponto alvenas Arizonon (1962-1971). Paĝoj el la historio de usona ŝtato Arizono. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1993. 12p. 22cm. 2,70 gld.

Lun-ŝafidoj. Lirika konfeso pri Hortobágy. Éva D. Kovács. El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Debrecena Bulteno, 1997. 56p. 21cm. Kun ilustraĵoj de la aŭtorino. Fabeloj kaj poemoj inspiritaj de migradoj sur hungara stepo. 9,00 gld.

Mistero ĉe Nigra Lago. Originala romaneto por infanoj. Sten Johansson. Ilus-

tris Beatrix Svenonius. Skövde: Al-fab-et-o, 1997. 80p. 21cm. Ses E-parolantaj infanoj spertas streĉan aventuron dum ferioj. 12,60 gld.

Mi trafis. Jonas Biliūnas (1879-1907). Ilustris Rūta Lelytė. El la litova trad. Telesforas Lukoševičius. Panevėžys: E-Klubo "Revo", 1994. 20 (nenumeritaj) p. ISBN 9986 496 00 4. 26cm. Ĉiupaĝaj ilustraĵoj. Mortigo de kateto instruas knabeton pri la malbono de agresemo. 3,90 gld.

Multkulturaj familioj de nuntempa Eŭropo. Aktoj de la seminario okazinta 01-02.08.1996. Div. aŭtoroj. Bratislavo: Esprima, 1996. 166p. ISBN 80 85586 07 X. 21cm. Kun resumoj en la angla kaj slovaka. Specife pri Esperantaj kaj slovakiaj familioj. 15,00 gld.

Navahoaj ĉifroparolantoj de Arizono (1941-1945). Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 15p. 22cm. Pri la unika kontribuo de arizonaj indianoj al usonaj milit sukcesoj en Pacifiko. 3,30 gld.

Notoj pri nuntempa usonindiana muziko. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 16p. 22cm. 3,30 gld.

Nova vortaro Esperanto-persa. Mahmud Moŝkeri. Tehrano: Nedaje Farhang, 1996. 391+18p. ISBN 964 91488 0 9. 24cm. Bind. 9500 kapvortoj, 12 000 derivaĵoj. 90,00 gld.

Nur tri lupidoj. Vytautas Petkevičius. Ilustris K. Kasparavičius. El la litova trad. Palmira Lukoševičienė kaj Telesforas Lukoševičius. Panevėžys: E-Klubo "Revo", 1994. 36 (nenumeritaj) p. ISBN 9986 496 01 2. 23cm. Ĉiupaĝaj ilustraĵoj. Kiel lupino perdis siajn idojn. 6,00 gld.

Oklahomaj kontrabandistoj. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 18p. 22cm. Novelo el epoko de alkohola malpermeso. 5,40 gld.

Op een veld van graniet (1983). István Nemere (1944). En la nederlandan trad. Nora Bartels. Beverwijk: la tradukinto, 1997. 178p. ISBN 803630 01. 21cm. Traduko de la romano *Sur kampo granita*. 24,90 gld.

Patro Kino. 17a-jarcenta misiisto ĉe sudarizonaj indianoj (1681-1711). Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1993. 16p. 22cm. 3,30 gld.

Perua venĝo. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo. 18p. 22cm. Novelo pri intrigoj en usona universitato. 3,90 gld.

Por politiko de Esperanto. Andrea Chiti-Batelli. El la franca trad. Umberto Broccatelli. Rotterdam: UEA, 1997. 23p. 21cm. Esperanto-Dokumento 34E. Pledo por tuja ekago kontraŭ lingva hegemonio. 4,80 gld.

Pour une politique de l'espéranto. Andrea Chiti-Batelli. Francilingva. Rotterdam: UEA, 1997. 24p. 21cm. Documents sur l'Espéranto 28F. Vd. ĉi-supre. 4,80 gld.

Prevento kontraŭ averioj de loĝdomoj en kvazaŭsismaj regionoj / Psika higieno[.] la bazo de feliĉo kaj sano. Andrzej Kaniak / Jerzy Lechowski. Jelenia Góra: Libro, 1993. 13p. ISBN 83 85033 07 3. 20cm. "Sciencaj Aktoj" de AIS, Vol. 3/1993. 3,60 gld.

Salutoj el Kudova Zdrój. Leszek Łękowski (1933). El la pola trad. Zofia Kamie-

niecka. Bydgoszcz: la aŭtoro, 1996. 11p. 21cm. Dulingva: E-pola. Sep meditemaj poemoj. 1,80 gld.

Spartante la mondon pere de Esperanto. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 19p. 22cm. Paralela teksto en la angla (trad. la aŭtoro) kaj Esperanto. Eseo pri Esperanto kiel ebligilo de specifa mond-percepto. 3,90 gld.

Sur misiista barko. Jan Pałyga. El la pola trad. Henryk Wower. Pilica: La tradukinto, 1996. 60p. 21cm. Pionira laboro de pola misiisto en Amazonio en la 70-aj jaroj. 9,00 gld.

Svedaj birdoj. Proponoj al Esperantaj sciencaj kaj komunlingvaj nomoj. Malte Markheden (1911). Sjö Haga: la aŭtoro, 1996. 26p. 21cm. Kvarcento da nomoj latine, Esperante kaj svede. 6,00 gld.

Stonadoranto, La / The Stone-Worshiper. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 19p. 22cm. Paralela teksto en la angla (trad. la aŭtoro) kaj Esperanto. Anekdotoj pri la facililo aranĝi "dezertgardenon". 5,40 gld.

Tragedio apud Hilao-Rivero. La kvinjara kaptiveco de blankrasa junulino ĉe Mohavaj indianoj (1861-1866). Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1993. 16p. 22cm. 3,30 gld.

Tri ursoj, La. Adaptis Hanna Hutchinson. Ilustris Edward Nofziger. El la angla trad. David Crowell. Cincinnati: Another Language Press, 1995. 19p. ISBN 0 922852 40 5. 18x21cm. Neatendita vizito de knabino ĉe ursofamilio. 6,60 gld.

Vivo de Prometeo. B. Tornado (ps. Boris Tokarev, 1927-94). Moskvo: Impeto, 1996. 263p. ISBN 5 7161 0031 7. 20cm. Epopeo en pli ol 10 mil versoj pri la vivo de homa gento en la praepoko. 24,90 gld.

DIVERSAĴO

Kompakta disko: Koro-sutro, La. Lou Harrison (1917). San Francisco: New Albion Records, 1988. 72 min. Tri modernaj muzikaĵoj (1972-1986) komponitaj de kunlaboranto de John Cage. La unua estas kantata en Esperanto (trad. Bruce N. Kennedy). 39,00 gld.

Kompleto: Mazi en Gondolando. Wendy Harris. Esperantigis R. Dobrzyński, M. v. d. Horst-Kolińska, S. MacGill, A. Pettyn. Den Haag/Warszawa: Internacia E-Instituto/Tommy, 1996. 2 libroj (159p. resp. 93+5p. ISBN 83-85677-40-2 resp. 83-85677-60-7. 20 resp. 24cm) + 1 sonkasedo + 1 VHS-vidbendo kun la 16 kvin-minutaj eroj de la televida varianto de la intergeneracia E-kurso por infanoj, gejunuloj kaj plenaĝuloj. 99,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

LA DILIGENTA KOLEGARO

De hobbio al profesia uzo

En la Praga UK inter la plej aĉetataj verkoj de la libroservo furoris eldonaĵoj de KAVA-PECH. Ni petis intervjuon de ĝia fondinto kaj estro, d-ro Petro Chrdle.

La nomo aspektas strange kaj ne Esperante...

KAVA-PECH estas mallongigo de "Kongresa kaj kleriga entrepreno de Petro Chrdle" en la ĉeĥa. Mi fondis ĝin en 1991, apud mia normala profesio ĉe la Fervoja Esplorinstituto Praga, komence nur hobi-cele. Sed kelkaj kialoj igis min sendependiĝi. Unue, mi ofte disopiniis kun mia direktoro en la instituto, kio malhelpis realigi miajn projektojn; due, pli grave, vidante mian entuziasmon pri entreprenado, mia edzino Stanjo donis al mi kiel bazan kapitalon la enspezon pro sia ĵus vendita domo. Promesplena komenco igis min optimisma pri la perspektivo resti sendependa, fari kion mi mem volas kaj opinias utila kaj grava, kaj tamen relative bone vivteni min kaj mian familion.

Sed kiel kongresa kaj kleriga entrepreno fariĝis ankaŭ eldonejo?

Mi devas konfesi: tute neplanite. Kiam mi organizis internaciajn konferencojn kaj volis aperigi ties prelegkolektojn en 200-300 ekzempleroj, mi

kontaktis por tio multajn eldonejojn. Ĉiuj aŭ tuj malakceptis la mendon pro la eldonkvantoj ridinde malaltaj por ili, aŭ ofertis astronomian prezon: do mi devis rezigni. Sekve mi mem aĉetis licencon por funkcii kiel profesia eldonejo kun la jama nomo KAVA-PECH kaj komencis prepari la unuajn eldonaĵojn. Ĉar tiun laboron ne nur mi trovis interesa, sed ankaŭ mia edzino, ni tre baldaŭ komencis apliki en nia eldonejo nian komunan hobion — Esperanton. Ĝis nun ni eldonis entute 43 librojn kun propra ISBN-registronumero, el kiuj 28 iel rilatas al Esperanto. Krome, ĉar ni specialiĝis pri malaltaj eldonkvantoj (200-3000 ekzempleroj), ni ofte prizorgas laŭ mendo librojn kun alies ISBN, aŭ verkojn de aŭtoroj sen ISBN: precipe en la germana kaj ĉeĥa lingvoj, sed baldaŭ verŝajne ankaŭ en Esperanto.

Kia estas la rilato de la menciitaj 28 verkoj al Esperanto?

Dek du el ili estas skribitaj komplete en Esperanto, ĉu origine verkitaj, ĉu

Kelkaj titoloj de Kava-Pech ĉe la Libroservo de UEA

Aŭdienco. Unuaktaĵo. Václav Havel. El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. 1996. 39p. 19cm. 4,80 gld.

Famaj kantoj por belaj horoj. Kasedo. Kantas K. Kudlíková, M. Smyčka. Trad. Joachim Giessner. 1995. Kun tekstoj. 18 kantoj el operoj kaj operetoj. 64 min. 17,10 gld.

Kantoj de l' popolo. Kasedo/kompakta disko. Ĥoro Cantica. Muzikensemblo Kečka. Prago: Kava-Pech/Giessner, 1993. 61-minuta. 28 slovakaj popolkantoj. 13,20 resp. 19,80 gld.

Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. Josef Kavka. 1996. 32p. 21cm. 4,50 gld.

La latina kiel interlingvo. Latein als internationale Sprache. Věra Barandovská-Frank. 1995. 191p. 21cm. Monografio pri la estinteco, nuno kaj pluo de la latina lingvo. 24,00 gld.

Lingvo kaj kibernetiko. Red. D. Maxwell, M. Preetu, A-P. Tacu. 1994. 143p. 21cm. Plenaj tekstoj aŭ resumoj en Esperanto. Prelegoj de la 6-a kongreso (1993)

de Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko. 24,60 gld.

Milito kontraŭ salamandroj. Karel Čapek. El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. 1994. 197p. 21cm. Romano pri la senpovo de la homo kontraŭ ribelantaj amfibiaj robotoj. 18,00 gld.

Ne nur soldato Ŝvejk. Elektitaj rakontoj. Jaroslav Hašek. El la ĉeĥa trad. S. Kamarýt k.a. 1994. 246p. 20cm. Red. M. Malovec. Kvardek rakontoj de fama satiristo. 25,50 gld.

Peza vino / Těžké víno. Eli Urbanová. Esperanta-ĉeĥa. Aranĝis kaj ĉeĥigis Josef Rumler. 1996. 37p. 20cm. 12 elektitaj poemoj. 4,50 gld.

Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj. Petr Chrdle. 1995. 40p. 20cm. 4,50 gld.

La propra biografio de Karolo la IV-a. El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. 1995. 87p. 20cm. 12,00 gld.

Sonĝo kaj aliaj rakontoj. Franz Kafka. Elektis kaj el la germana trad. Wilhelm Luttermann. 1996. 102p. 20cm. La fama *La transformiĝo* kaj 16 aliaj rakontoj. 15,00 gld. (Vd. majo, p. 93.)

La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto. Red. Petr Chrdle. 1995. 191p. 21cm. Prelegkolekto de la samtitola kolokvo de la Akademio de Esperanto (julio 1994). 27,60 gld.

Vortaro Esperanta-ĉeĥa. Karel Kraft, Miroslav Malovec. 1995. 239p. 17cm. Ĉ. 26 000 vortoj. 26,40 gld.



Petro Chrdle

tradukitaj — plejparte el la ĉeĥa. En tri plurlingvaj verkoj unu el la lingvoj estas Esperanto. Du prelegkolektoj en naciaj lingvoj portas Esperantajn resumojn. Kvar eldonaĵoj apartenas al la kategorio lingvaj helpiloj, kaj sep ĉeĥalingvaj titoloj estas tradukoj de Esperanto-originaloj. Tiun lastan mi konsideras la plej grava kategorio, ĉar ĝi celas neesperantistojn, kiujn la kolofono, sed ofte ankaŭ antaŭparolo aŭ eldonista noto, sciigas pri la viveco kaj utileco de Esperanto.

Laŭ kiuj kriterioj vi elektas verkojn Esperantajn por nacilingva eldono?

Kvankam por Esperantujo ni eldonas ankaŭ beletron, en la ĉeĥa ni devas respekti la orientiĝon sciencon — ofte popularsciencan — kaj fakan de nia eldonejo. El Esperanto ni do elektas ĉi tiajn verkojn, da kiuj ekzistas sufiĉe, precipe se konsideri ankaŭ manuskriptojn neeldonitajn. Tiel mi publikigis ĉeĥe i.a. *Danĝero de tropikaj malsanoj* de Rüdiger Sachs, *Formulo de ekonomia sukceso* de LEE Chong-Yeong, *Kiel sukcesplene negoci kun japanoj* de Yosimi Umeda, *Nova realismo* de Bruno Vogelmann kaj *Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo* de KURISU Kei. Ĉi lasta ja rilatas al beletro: elstara japana bohemisto rakontas kial li lernis la ĉeĥan kaj kiel Esperanto multe helpis al li eĉ en liaj tradukoj. Tamen mi ĝin eldonis, ne nur pro amikeco kaj estimo al la aŭtoro, sed precipe tial ke lia verko tiom bele kaj sentrude informas pri la ebloj kaj forto de Esperanto.

La lasta serio de tradukoj el Esperanto aperas ne en la ĉeĥa, sed pri ĝi, en diversaj lingvoj. Temas pri tradukoj de *Baza ĉeĥa konversacio* de S. Chrdlová kaj M. Malovec, kiun ni eldonis por la kurso “La ĉeĥa eksprese” en la Praga UK. Ĝi tiom plaĉis al diverslingvaj uzantoj ke ni decidis eldoni ĝin por turistoj en Ĉeĥio. Ĝi jam aperis en la germana (tr. Reinhard Fössmeier) kaj en la angla (tr. Richard Howard), estas eldonota en la franca (tr. Hélène Barkovic), kaj prepariĝas tradukoj al la japana, korea, rusa kaj nederlanda lingvoj.

Ni revenu al via oferto al la Esperant-lingva merkato.

Ne plu necesas prezenti la poetinon Eli Urbanová, de kiu ni eldonis intiman poemaron, *Peza vino*, dulingve, en ĉeĥa vesto fare de Josef Rumler. En belarta prozo ni strebas prezenti elstarajn verkistojn el Ĉeĥio: Karel Čapek, Jaroslav Hašek, Václav Havel, Franz Kafka. El la fakaj kaj edukaj verkoj mi nomu almenaŭ *La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto* (prelegkolekto de la unua Akademia kolokvo), *Kontribue al PIV* de Josef Kavka (pri homonimioj en Esperanto), la prelegaron *Lingvo*

kaj kibernetiko, aŭ verketon en kiu mi resumas spertojn bonajn kaj malbonajn pri *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*.

Kiuj estas viaj plej proksimaj planoj?

En Adelajdo mi volus prezenti *Sonĝonovelo* de la aŭstra verkisto Arthur Schnitzler, kiun el la germana tradukis Michel Duc Goninaz. Kvankam rilate belarton mi ja preferas aperi tradukojn de ĉeĥaj verkoj, *Sonĝonovelo* tiom kaptis min ke mi faros escepton — kvankam ne tro grandan, ĉar en la komencaj jaroj de la vivo de Schnitzler Ĉeĥio ja apartenis al la aŭstra-hungara imperio, do ni estas iusence samlandanoj. . .

La plej granda eldonplano pri kiu mi revas, koncernas preskaŭ finredaktitan ĉeĥan-Esperantan vortaron de pli ol 500 paĝoj, kiun preparas Karel Kraft kun deko da kunlaborantoj. Mi devas konfesi ke mi ne disponas la bezonatan kapitalon, sed jam vidiĝas esperplena realigeblo, parte per antaŭmendo de la libroservo de Ĉeĥa E-Asocio, parte per sponsora kontribuo de la filo de s-ano Kraft.

Adreso: Kava-Pech, pla d-ro P. Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prah), Ĉeĥio; ☎ +420/2/991-22-01; ✉ 991-21-26; <chrdle@kava-pech.cz>

KULTURO

FAME serĉas premiotojn

FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj distingas personojn kaj instituciojn per sia prestiĝa **Esperanto-Kulturpremio de Aalen** je 10 000 germanaj markoj, plej alta premiosumo en Esperantujo. Proponi kandidatojn por tiu ĉi premio rajtas ĉiu ajn, ankaŭ memproponoj eblas. Kun la propono oni sendu argumentojn kaj eventuale dokumentojn kiuj povas pruvi ke kandidato meritas atribuiĝon de la premio.

Laŭ la statuto povas ricevi ĝin personoj, organizaĵoj kaj institucioj kiuj

- dum konsiderinde longa tempo
- gajnis meritojn pro stimulado de internaciaj kompreniloj
- en la kadro de la statutaj celoj de FAME-fondaĵo
- per kreado, verkado, utiligo aŭ disvastigo de kulturaj verkoj.

La premion FAME kreis komune kun la germana urbo Aalen, kie troviĝas la Germana Esperanto-Biblioteko. La transdono kutime okazas dum solena matineo en Aalen.

Krome FAME serĉas kandidatojn por sia **scienca premio** je sumo de 3000 germanaj markoj. Por ĝi validas apartaj kriterioj, pri kiuj oni petu koncernan informfolion ĉe la suba adreso.

Kandidato-proponojn direktu letere ĝis plej malfrue la 30-a de septembro 1997 al la FAME-prezidanto: Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio.





• Ĉinio: Honkonganoj gratulataj

Sepdek aziaj e-istoj konferencis en Kantono (18-20 apr.) pri E-turismo. Kun pli ol dek honkonganoj okazis vespero por gratuli la re-aligon de Honkongo al Ĉinio. (Peng Z.)

E-istoj en Chengdu rememoris la 5-an de aprilo en la Tombejo de Martiroj pri la e-ista pioniro Eltunko (XU Shouzheng) kaj lia lernanto YANG Fuchen, arestitaj en 1948 pro aktivado por E-o kaj demokratio, kaj ekzekutitaj en 1949. Ĉe la tomboj ZHONG Dingwen parolis pri Eltunko, kiu instruis E-on eĉ en malliberejo, kiam ankaŭ Zhong troviĝis tie. (Fu S.)

• Finnlando: Propraj ejoj pro UK

Dank' al la ricevita parto el la kongresa gajno de la Tampere UK, la loka klubo Antaŭen aĉetis por si urbocentran ejon. La lokalo, nomata Nesto, estos inaŭgurita la 23-an de aŭgusto kiel konstanta oficejo kaj klubejo de Antaŭen. (J. Laaksonen)

Ankaŭ la alia ricevanto de kongresa gajno, la ĉi-jare 90-jara E-Asocio de Finnlando, decidis aĉeti, kun 40%-a partopreno de E-klubo de Helsinko, novan lokalon. Ekde junio la adreso de EAF do estas: Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki. (*Esperantolehti*)

• Koreio: Nova oficejo en Seulo

La 3-an de majo la Centra Oficejo de Korea E-Asocio translokiĝis: Kang Byeon Han Shin Core B/D N-ro 1601, Mapo-Dong 350, Mapo-ku, Seoul, Koreio; ☎ +82/2/717-69-74; ☎/☐ 717-69-75; <keast@soback.kor.net>.

• Svedio: Eŭropa deklaro

Laŭ Per Gahrton, sveda eŭro-parlamentano verdula, unu el la kialoj de lia partio "preferi alian formon de internacia kunlaboro ol EU" estas "la malfacilo krei precizan egalecon por ĉiuj lingvogrupoj en konfederacio de ŝtatoj kun multaj malsamaj lingvoj", kaj ke, se oni iam limigus la nombron de EU-laborlingvoj kaj leviĝus la demando de komuna lingvo, al li Esperanto "ŝajnas evidente pli bona elekto ol la angla". (*L'Esperanto*)

• Bosga: Doktoro kun E-resumo

TEJO-aktivulo Sjoerd Bosga, konata i.a. kiel redaktinto de la plurlingva TEJO-bulteno *Dialog*, doktoriĝis la 23-an de majo en la Teknika Universitato de Eindhoven pri "Nesimetria nutrado de nesinkronaj maŝinoj", en ĉeesto de i.a. deko da esperantistoj. Lia libroforme aperinta tezo, anglalingva, havas nederlandan kaj Esperantan resumojn.



Foto: Cilly Magalhães

• Casares: Plena aprobo por Esperanto

Kiam la 15-an de majo la renoma argentina verkisto Adolfo Bioy Casares prelegis en Roterdamo, CO-stabano Franĉjo Veuthey (*ne* sur la bildo) demandis lin, verkiston de fantastaj rakontoj ofte ligitaj al inventoj kaj inventistoj, pri lia opinio rilate la "inventadon" Esperanto. La kreinto de 'la romano *La inventaĵo de Morel*' respondis: "Ĉiam ŝajnis al mi bona la ideo pri internacia lingvo. Mi neniam inkludigis aŭ menciis ĝin simple pro tio ke mi ne konas ĝin, mi neniam studis ĝin". La intima kunlaborinto de Jorge Luis Borges firme asertis fine: "Esperanto havas mian plenan aprobon."

• Pavskij: Escepto por Esperanto

"Kvankam ni havas perlaboritan monon" skribas Bogdan Pavskij al *Ruslanda E-isto* el malliberejo, "estas problemo sendi ĝin, ĉar la administracio retenas ĝin, dirante ke mono necesas por la prizonoj bezonoj. Sed ĉar mi estas e-isto — neordinara okazo por la prizono —, la prizonestro fine faris escepton kaj diris 'konsentite'."

• Tanskanen:

Omaĝita per propra muziko

Estrarano de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj kaj de la finna blindula Esperanto-asocio Steleto, Raimo Tanskanen estas ankaŭ instruisto, kantgvidanto, orgenisto kaj komponisto. Honore al lia 60-jariĝo, la 23-an de marto estis aranĝita en Helsinko festkoncerto el iuj el liaj komponaĵoj. Pro sia multflanka, merithava kultura laboro inter vid-handikapitoj, Tanskanen ricevis kulture premion de la prezidanto de ties federacio. En la nomo de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj Esperanto-klubo de Helsinko gratulis Anna-Liisa Heikkinen, transdonante standardon de ambaŭ asocioj. (R. Sabelli)

• Umesao: Prezidas patrono

UMESAO Tadao, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝis, post la forpasinta KUBO Sadazirō, la prezidanto de Japana E-Instituto. La posteno de prezidanto ne identas kun tiu de la prezidanto de la JEI-estraro: ĉi lasta (YAMASAKI Seikō) ŝarĝas sin per la ĉiutaga laboro de la asocio. (*La Revuo Orienta*)

Fake



Interlingvistiko: 40 prelegoj en 2 tagoj

La jubilean konferencon feste al la 30-jara ekzisto de la Esperanto-Fako ĉe la Universitato ELTE de Budapeŝto (17-18 apr.) partoprenis ĉ. 100 personoj el pluraj landoj. Estis prezentitaj ĉ. 40 mallongaj prelegoj en 4 sekcioj (E-kulturo, instruado, lingvistiko, movadhistorio), i.a. de Werner Bormann, Detlev Blanke, Blazio Vaha, Christian Lavarenne, Mauro La Torre, Ilona Koutny. Laŭ la planoj la konferencaj prelegoj aperos ankaŭ libroforme ĉe ELTE. (*Eventoj*)

Komputado: Helpo por pli simpla adreso

Multaj E-informpaĝoj havas komplikajn adresojn, ofte sen la vorto "Esperanto". Sveda E-Federacio, registranta por sia uzo la adresojn "esperanto.se", pretas helpi al adres-simpligo de ies ajn E-informpaĝoj. Ekzemple, se la informejo de "Tutmonda Esperanto-Amikaro" (TEA) nun troviĝas ĉe <http://

/www.uni-k.xy/~magdak/esperanto/tea/info.html, post prunto de la SEF-adreso sufiĉos skribi <http://www.esperanto.se/tea/. La informejo de TEA mem ne moviĝos al la servilo de SEF; nur ĝia startadreso ŝanĝiĝos. (Notinde, la ŝanĝo ne donos la retpoŝtan adresojn <io_ajn@esperanto.se>.) Tiu servo kostas unu membrokotizon (MA) de UEA, pagendan al Fondaĵo Canuto. (Interredaktore)

Radio: Nova adreso en Sorokabo

Rádio CBN Clube de Sorocaba (1080 kHz, AM) elsendas ĉiusabate de 20:00 ĝis 21:00, kun regiona aŭdebleco. Nova adreso: Av. Washington Luiz, 1200, CEP 18030-270 Sorocaba – SP, Brazilo.

Spiritaj fortoj: Vojaĝo en Baltio

Detlef Meier (Hauffstr. 15, DE-63071 Offenbach, Germanio), kiu gvidas la E-komunumon de Amikaro Bruno Gröning, okupiĝanta pri saniĝo per spiritaj fortoj, prelegis marte kaj aprile po unufoje en Litovio kaj Latvio antaŭ e-istoj kaj kvarfoje en Estonio (el kiuj tri kun traduko el E-o al la estona). En Estonio kaj Litovio aliĝis al la Amikaro i.a. kvar e-istaj kuracistoj, kiuj apartenos al la Medicin-Scienca Fakgrupo (MSF) de la Amikaro, kontrolanta la raportojn pri saniĝoj. (D. Meier)

ANONCETOJ

Bildkartojn el la tuta mondo atendas E-klubo: Verda Kolombo, Inga Briede, Labrenĉi – 12, p/n Tērvete, Dobeles raj., LV-3728 Latvio.

Eventoj, spirallbinditaj jarkolektoj, 1992-96, nur kelkaj ekzempleroj! 40 NLG/jaro. Redakcio: pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario.

Ĉu Tibor Sekelj iam skribis pri siaj spertoj en Kostariko? Informu: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, Kostariko; <miaumiau@sol.racsa.co.cr>.

ZEO-j: En Francio kaj Italio

Placo kaj doma ensemblo en Fouquières-lez-Lens (Francio), kiun urbestras UEA-membro Michel Bouchez, havas la nomojn Ludwik Zamenhof resp. Esperanto ekde la 1-a de marto, kiam okazis inaŭgura festo kun 200 ĉeestantoj. (*SAT-Amikaro*)

La 6-an de aprilo parko en Udine (Italio) ricevis la nomon "Ĝardeno Esperanto". Post la inaŭgura soleno okazis itallingva debato de intelektuloj pri "Interkompreno — mezuro de komparo kaj solidareco inter popoloj", kies referaĵojn la loka Esperanto-grupo Nova Espero Friuli planas eldoni en broŝuro.

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Danlando: Birgitta Maria Henriksen, Kim Jan Henriksen, Maria Henriksen. Finnlando: Leena Huttunen. Francio: Lucette Negron.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Finnlando: Hemmo Tietti.

AMIKOJ (minimumo \$10): Usono: Steven Rinker.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Argentino: Atilio Orellana Rojas. Aŭstralio: Idyss Einihovici. Francio: René Ballaguy; Richard Cash. Japanio: Kazuyuki Hosomi. Litovio: Paul K. Jegorovas. Nederlando: W.F. Huppertz. Reunio: Pierre Lelièvre.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Britio: Eric W. McCanlis. Ĉinio: XIANG Zhe Wen; JIN Ying Zi; XU Ying Ji. Danio: Ejnar Hjorth. Finnlando: Harri Tuomola. Germanio: Albrecht Kronenberger; Horst Gruner. Japanio: Kyotaro Deguti; Kazuyuki Hosomi. Litovio: Paul K. Jegorovas. Nederlando: Oene Hoekstra; Maud Meijwes. Norvegio: Tamiko Kaiakami-Nielsen. Svedio: Gunnar Olsson; K.G. Lennart Lagerkrantz; Tore Fors.

DONACOJ 1997 (NLG)

ĝis la 31-a de majo

Fondaĵo Afriko: Finnlando: H. Tietti 50,00. Norvegio: Norvega Esp-Ligo 135,00. Svedio: J. Hammarberg 24,88. Norrköpings Esp-klubb 300,00. Svislando: E-Grupo La Stelo, Ĝenevo 268,00. Sumo ĉi-jara 7001,29.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: J Gonçalves de Lima 50,00. Finnlando: T. Sormunen 800,00. Usono: W.R. Harmon 48,13. Sumo ĉi-jara 1131,13.

Fondaĵo Azio: Hispanio: Esp-Biblioteko en Katalunio 31,81. Japanio: Y. Aida 30,59; J. Amano 30,80; Y. Hayakawa 30,59; K. Hayasi 30,80; A. Hosida 30,80; H. Hukamoto 154,00; K. Huzimaki 30,80; M. Isino 61,60; M. Iwai 30,59; Y. Izumi 16,58; K. Kai 30,80; K. Kakehi 154,00; E. Kimura 30,80; S. Kitagawa 33,16; Y. Maeda 30,80; H. Miedema 30,80; M. Nakatu 61,18; T. Nisio 46,20; T. Oohara 30,80; Y. Oozato 30,59; T. Saitou 33,16; Y. Sawaya 30,80; T. Suzuki 92,40; H. Tai 30,80; K. Takuma 61,18; H. Takubo 92,40; H. Tani 30,80; T. Taniguti 52,36; M. Toyoda 46,20; K. Ueno 61,60; Y. Yazaki 30,59. Korea Resp.: LEE

Chong-Yeong 100,00. Svislando: Esp-Grupo La Stelo, Ĝenevo 134,00. Sumo ĉi-jara 3252,22.

Fondaĵo Canuto: Finnlando: H. Tietti 100,00. Francio: P. Zilliox 33,30. Kanado: R. Brisebois 11,19. Korea Resp.: LEE Chong-Yeong 100,00. Usono: I. Leland 16,00. Sumo ĉi-jara 2525,07.

Ĝenerala Kaso: Germanio: J. Rawling Keitel 224,51. Nederlando: P.H. Damsté 200,00; M. Meywes 300,00. Sumo ĉi-jara 2134,09.

Konto Espero: Finnlando: H. Tietti 50,00. Germanio: H.G. Strauss 112,30. Nederlando: M.B. van Bentum-v.d. Broek 50,00; fam. Bossong 50,00. Sumo ĉi-jara 2426,56.

Junulara Fondaĵo: Brazilo: W. Pereira Deslandes 42,00. Sumo ĉi-jara 205,39.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Finnlando: S. Mynttinen 200,00; H. Tietti 50,00. Svedio: O. Olsson 123,00. Sumo ĉi-jara 398,00.

Volontula Fondaĵo: Finnlando: S. Mynttinen 300,00. Sumo ĉi-jara 630,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Ĉiutagaj raportoj el Adelajdo

Dank' al subteno de UEA kaj TEJO, Pola Radio prezentos dum ĉiu tago de la UK en Adelajdo prikongresajn raportojn de sia speciala sendito, redaktoro Andrzej Pettyn. Dum la tuta kongresa semajno oni povos informiĝi pri la kongresaj debatoj en ĉiuj 4 elsendoj per 5-10-minutaj raportoj. Post la reveno de la raportisto al Varsovio oni aŭdigos amason da sonraportoj, intervjuoj ks. Bonvolu informi pri tio viajn gemikojn, samklubanojn ktp. Pose-dantoj de satelitaj riceviloj estas petataj surbendigi la raportojn kaj disponigi ilin al aliaj klubanoj. Tre verŝajne la prikongresajn raportojn oni povos ankaŭ legi en la hejmpaĝo de la E-Redakcio de Pola Radio, kies adreso estas jena: <http://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/polrad.htm>.

En la unua kvarono de la nuna jaro la Eksterlanda Programo de Pola Radio ricevis entute 1770 leterojn kaj 5083 raportojn pri aŭskultado. El tio al la Esperanto-Redakcio venis 813 leteroj (46%!) kaj 1369 raportoj (27%). La E-Redakcio do plifirmigis sian pozicion kadre de la Eksterlanda Programo. Al tiu bona rezulto sendube kontribuis la vasta agado de Amikaro de Esperanto en Radio, de Bruno Masala kaj de PEJNO Simono.

Andrzej Pettyn (Pola Radio)

Ĝustigo

Elpin, kiun vi mencias en la nekrologo pri Li Hajpin (apr., p. 80) kiel "ĉinan pioniron", estis ĉina nur se vi uzis la vorton *ĉina* en la senco "ĉinia".

Elpin aŭ Usan estas pseŭdonimo de AN Useng (1907-1991), la plej granda koloso de la korea Esperanta literaturo, kies E-verkojn mi nun kolektas por eldoni libroforme. Elpin kun la familio elmigris al Ŝanhajo, kie en 1919 fondiĝis "korea provizora registaro", al kiu li grande kontribuis per sia lingvokapablo. Li ja multe agadis ankaŭ por la ĉina E-movado kaj esperantigis verkojn el la ĉina, i.a. novelojn de Lusin.

CHOE Taesok (Koreio)

Alfredo BASSETTI (1912-1997), dum 50 jaroj animo de la E-movado en Trento (Italio) kaj prezidinto (1966-94) de la loka E-grupo, delegito pri fervojoj kaj turismo, mortis la 25-an de februaro.

Ernest ELLIOTT (1896-1997), prezidinto de Brita Orientmezlanda Federacio, mortis en februaro, kvar monatojn post sia 100-jariĝo.

Ferenc FODOR (1929-1997), prezidinto de Vojvodina E-Ligo, 35 jarojn delegito en Novi Sad (Jugoslavio), kiu ofte prelegis kaj gvidis kursojn, forpasis la 21-an de marto. Li postlasis manuskripton de konversaci-libro Esperanta-serba.

Guillermo GARCIA MURILLO (1941-1997), profesoro pri filozofio ĉe la Universitato de Kostariko, kie li helpis enkonduki Esperanton, forpasis la 9-an de aprilo. Li estis kunfondinto (en 1996) kaj estrarano de Kostarika E-Asocio.

Rowland G. GRIFFITHS (1920-1997), iama delegito en Leicester kaj prezidinto de Brita Orientmezlanda Federacio, mortis en februaro.

Peter HARVEY (1915-1997), 50 jarojn aktiva en la regiono de Glasgovo (Britio) kaj 25 jarojn en Internacia Fervojista E-Federacio, prezidinto de Glasgova E-Societo (1985-86), mortis la 5-an de marto.

Hans-Jürg KELPIN (1935-1997), pastoro, aktivulo de Kristana E-ista Ligo Internacia, delegito pri teologio en Greussen (Germanio), mortis la 2-an de aprilo. Li aktivis ekde 1977 kiel estrarano de la orient-germana tutlanda asocio GDREA kaj prezidis (1982-90) la distriktan E-organizaĵon en Erfurt.

František KOŽÍK (1909-1997), populara ĉeĥa verkisto, granda subtenanto de Esperanto, forpasis la 5-an de aprilo. Inter 1933 kaj 1940 li estis radio-regisoro ĉe la Verda Stacio en Brno, elsendanta en Esperanto. El liaj verkoj E-lingve aperis la antologieto *Poeto ne mortas* (1984) kaj la romano *Lumo en tenebroj* (1992); atendas publikigon la romanoj *La plej eminenta el Pierotoj* kaj *Super valoj mateniĝas*,



František Kožík

tradukitaj de Josef Vondroušek kaj Jiří Karen.

Juan LICERANZU ORTEGA (1914-1996), fondinto de la E-Grupo en Bilbao (Hispanio), ofta partoprenanto de Universalaj Kongresoj, mortis la 8-an de decembro.

Anna MILATOVÁ (1910-1997), 40 jarojn delegito pri turismo en Trinec (Ĉeĥio), forpasis en aprilo.

Madge SILIA, dumviva membro, mortis lastatempe en Farmington (Nov-Meksikio, Usono).

John STEELE (1896-1996), ofta instruinto kaj UK-partopreninto, eble la plej aĝa esperantisto en Britio, forpasis en decembro. Li organizis ambaŭ britajn E-kongresojn kiujn gastigis lia urbo Southport.

Slavko ŠIMUNIĆ (1937-1997), ĵurnalisto, tradukisto kaj eldonisto, forpasis la 12-an de aprilo en Zagrebo. Li kuntradukis en Esperanton *Make-donaj popolaj rakontoj* kaj kroatigis poemojn de Miĥalski kaj Baghy.

Alfred WOLLBACHER (1912-1996), delegito pri fervojoj kaj turismo en Bamberg (Germanio), forpasis komence de novembro.

Roger YAFIL (1921-1997), aktivulo en la Pariza regiono, delegito pri instruado de lingvoj, kiu partoprenis en multaj UK-oj, mortis en Chatou la 16-an de februaro. Li aŭtoris la infanan kurslibron *La familio muso*.

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA

LIBRO DE MIL ZEOJ

MONUMENTE PRI ESPERANTO. Ilustrita dokumentaro pri 1044 Zamenhof/Esperanto-objektoj en 54 landoj. Hugo Röllinger. Red. Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111 p. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld.

Post 30-jara laborado de Hugo Röllinger aperis ĉe UEA la libro *MONUMENTE PRI ESPERANTO*. Kiel komisiito de UEA Röllinger kolektis informojn pri ĉiuspecaj ZEOj, t.e. Zamenhof/Esperanto-objektoj: stratoj, placoj, parkoj, pontoj, konstruaĵoj, skulptaĵoj, ŝipoj, eĉ asteroidoj. Entute li registris 1044 ZEOjn en 54 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj. Tio postulis de li ne nur zorgan administradon sed ankaŭ multe da persistemo, intuicio kaj detektiva kapablo, dank' al kiuj la nuna dokumentaro estas kompleta registro de ZEOj de la jarcento 1896-1996. *MONUMENTE PRI ESPERANTO* enhavas, krom laŭlanda listo de la ZEOj kun indiko pri iliaj loko kaj jaro de ekesto, ankaŭ artikolojn, en kiuj la aŭtoro rakontas kolorplenajn historiojn de multaj el ili. La 111-paĝan abunde ilustritan libron redaktis Thomas Bormann.



LA PLEJ POPULARA LERNOLIBRO EN NOVA VESTO

SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE. Audrey Childs-Mee (1926-90). Rotterdam: UEA 1996 (6-a eld.). 194+40 p. ISBN 92 9017 050 6. 21 cm. Ilustrita de Stano Marček. Prezo: 24,00 gld.

Audrey Childs-Mee estis unu el la plej popularaj instruistoj de Esperanto. Tiu ĉi rektmetoda lernolibro rezultas el ŝiaj spertoj pri instruado en multaj landoj. *SALUTON! ESPERANTO AŬTODIDAKTE* taŭgas por uzo en memlernado kaj kursoj. De pli ol dek jaroj ĝi estas la plej populara internacia lernolibro de Esperanto. Ĝia sesa eldono aperis kun gaja plenkolora kovrilo.

 **Sonkasedo estas aparte havebla. Prezo: 12,00 gld.**

KAJ PLIE...

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI. Gvidilo por prepariĝi al la elementa kaj meza niveloj. Represo. 36 p. Prezo: 4,80 gld.

POLITIKA HEGEMONIO KAJ LINGVA HEGEMONIO EN EŬROPO. A. Chiti-Batelli, P. Janton. Propono por la eŭropa strategio de la Esperanto-movado. Esperanto-Dokumento n-ro 33E. 19 p. Prezo: 4,80 gld.

SENĜENAJ DIALOGOJ. Alberto Fernández. UEA fariĝis la ĉefdistribuanto de tiu ĉi fascine verkita kaj riĉe ilustrita libro pri la fundamentaj natursciencaj demandoj. 197 p. Prezo: 18,00 gld.

ZAMENHOF, BILDRAKONTE. G. Tilleux, B. Disano, J.M. Derzelle. UEA estas nun distribuanto ankaŭ de jena plenkolora bildstria biografio de Zamenhof. Grandformata. 18p. Prezo: 15,00 gld.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>



Tendaraj tagoj

tri kajeroj

- specife por junuloj 10- ĝis 14-jaraj
- speciale emfazas parol-kapablon
- alloge ilustrita de Pavel Rak
- kun notoj por instruistoj



Verkis Stefan MacGill.
Eldonis ILEI/UEA/HJEA.




Prezo: 12,00 gld. por la unua, 15,00 gld. por la dua kaj
18,00 gld. por la tria kajero. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA.

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen la plej

KSTAKTO

estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KSTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1997 **KSTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj



ABONTARIFO 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugallio	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al **Koresponda Servo Mondskala** jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. **KSM** transdonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. **KSM** estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



*Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.)
estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa
suplemento. Kune ili priskribas
preskaŭ 250 universitatajn studojn.*

Boza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. *Oferto:* Ambaŭ kune 23,50 gld.



Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz

Caixa Postal 3133, 20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo

ALMANAKO LORENZ	gld.
ĉiujara ekde 1981, filozofia, scienca, religia, 96-paĝa	10,00
BRAZILA ANTOLOGIO POEZIA	
trad. F. V. Lorenz, 324 poemoj, 120 aŭtoroj, 452 paĝoj	32,00
DE ANIMO AL ANIMO	
de H. Rohden, pri la ĉiutaga vivo, 206-paĝa	10,00
EINSTEIN LA ENIGMO DE LA MATEMATIKO	
de H. Rohden, biografio, 130-paĝa	7,50
HOMARANISMO LA INTERNA IDEO	
de D. P. Souza, pri la idealismo Zamenhofa, 50-paĝa	7,00
IMPERATIVOJ DE LA VIVO	
de H. Rohden, pri la ĉiutaga vivo, 156-paĝa	6,50
INFANOJ EN LA TRANSMONDO	
de F. C. Xavier kaj Marko, porinfana, kolorbilda, 78-paĝa	20,00
KAJ LA PLEJ NOBLA ESTAS AMO	
de A. M., travivaĵoj ĉe Sri Sai Baba, 185-paĝa	20,00
KOSMA FILOZOFIO DE LA EVANGELIO	
de H. Rohden, pri Evangelio, 194-paĝa	20,00
LUMO DE L' ESPERO	
de Divaldo P. Franco kaj Joanna de Angelis, 150-paĝa	8,50
MAHATMO GANDHI	
de H. Rohden, biografio, 180-paĝa	6,00
PATRO NIA	
de F. C. Xavier kaj Meimei, por infanoj kaj junuloj, ilustrita, 96-paĝa	20,00
PREDIKO SUR LA MONTO, LA	
de H. Rohden, pri Evangelio, 145-paĝa	12,00
SURVOJE AL LA KOSMA KONSCIO	
de H. Rohden, filozofia, 84-paĝa	5,50
TIEL DIRIS LA MAJSTRO	
de H. Rohden, pri Evangelio, 220-paĝa	20,00
TIO OKAZIS EN LA JAROJ 2000 KAJ 3000	
de H. Rohden, 38-paĝa	3,00
UNUJ PAŜOJ AL PERFEKTECO	
de Joachim Werdin, originalo, 62-paĝa	8,00
VALO DE L' NEBULO	
de Roque Jacintho, porjunula romano, 93-paĝa	8,00
VIVO FELIĈA	
de Divaldo P. Franco kaj Joanna de Angelis, 200-paĝa	12,00
VOJO AL FELIĈO, LA	
de H. Rohden, filozofia, 86-paĝa	10,00

- Libro mendeblaj ĉe UEA kaj BEL.
- Libro servoj ricevas rabaton de 50% plus afranko.
- Petu kompletan katalogon.